

ESPERANTO

TRIUMFONTO

Oficiala Organo de la XV-a Universala Kongreso de Esperanto. — Pùblikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj. Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolsciencia).

Protektantoj:

Dr. Leono Zamenhof, Warszawa
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Noria, komercisto,
Barce ona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank- kaj fabrikk-
direktoro, Kaunas.

N-o 143
1. 7. 1923

Redakcio:

Ĉefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
Zanoni (literaturo)
M. Butin, L. K.

Administracio:
(Preciza poŝtadreso)
Esperanto Triumfonto
Horrem bei Köln, Germanlando.

Tarifen
vidu sur speciala folio, kiu estas aldona-
ta al ĉiu specimena ka' unua numero
de nova abono.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

La nova aranĝo de ET.

Pro teknikaj kaj ekonomiaj avantaĝoj kaj respondante la ofte esprimitan deziron de multaj legantoj, ET de nun aperos en pli oportuna formato. La amplekso de ET kun aldonoj estos 6-8-paĝa, anstataŭ kiel ĝis nun 4-6-paĝa. Escepte en la semajnoj ĉirkaŭ la Universala Kongreso ĝi estos 4-paĝa.

Dum la Kongreso en Nürnberg ET aperos ĉiutage kun la kongresaj programoj kaj raportoj. Kiel pluan novaĵon ni povas sciigi la pli grandigon de nia redakcia stabo per sperta praktikisto s-o Robert Kreuz, la konata gvidanto de la Esperanto-reklamo de la Internaciaj Foiroj de Frankfurt a. M., kiu samtempe prenos sur sin la negocian direktadon de la Esperanto-fako de nia eldonejo.

Ni esperas, ke nia legantaro ĝojos pri la nova aranĝo kaj plue akcelos nian entreprenon per varbado de novaj abonantoj kaj de anoncoj, tiel konservante al ni sian ĝisnunan simpatian.

Eldonejo de ET.

Akademio.

Elektioj (junio 1923, anstataŭ 1922).

87 voĉdonoj.

1. Dietterle,	83 voĉoj	— posteno 5
2. Lippmann,	86	" " 4
3. Inglada,	65	" " 14
4. Millidge,	64	" " 12
5. Dombrowski,	65	" " 16
6. Bailey,	61	" " 17
7. Isbrücker,	57	" " 1
8. Migliorini,	55	" " 6

La 5 unuaj estas elektitaj por 8 jaroj (anst. 9). La posteno 11 (s-o Evstifejev, rusa) restas vakanta ĝis post la kongreso.

La 3 lastaj por 2 jaroj (anst. 3).

La Akademio konsistas nun el:

1-a Triono (rebalotota en 1928), Posteno 13: Lengyel, P. 15: Grosjean-Maupin, P. 18: Corret, P. 8: Kühnl, P. 2: Privat, P. 3: Cart.

2-a Triono (reb. en 1931) Posteno 5: Dietterle, P. 4: Lippmann, P. 14: Inglada, P. 12: Millidge, P. 16: Dombrowski, P. 11 (Evstifejev).

3-a Triono (reb. en 1925), P. 7: Nylén, P. 17: Bailey, P. 1: Isbrücker, P. 10: Christaller, P. 6: Migliorini, P. 9: Warden.

La estraro

de l' Akademio konsistas nun el:

Prez.: Cart, Vic-prez.: Warden kaj N., Sekcio Gramatiko: N., Sekcio Komuna Vortaro: Grosjean-Maupin, Sekcio Premioj kaj Konkursoj: Privat.

La elektioj en la estraron okazos dum la Nürnberg-a kongreso, aŭ, se ne eble, tre baldaŭ post la kongreso.

Tuj poste la Direktoroj de la Sekcioj starigos la specialajn fakajn komisionojn, kiuj dependas de ili.

Intertempe la Akademio elektos laŭ § 12b de l' Regularo Akademiajn Korespondantojn.

La Prezidanto de la L. K.:
Th. Cart.

17. junio 1923.

Pola ministro por Esperanto.

Bydgoszcz, 15-an de junio.

La dekretan de junio k. l. mi estis akceptinta por speciala intervido pri Esperanto de la ministro por internaj aferoj, s-o D-ro W. Władysław Kiernik, sejma deputito. S-o ministro akceptis min oficiale en sia laborĉambro, donante al mi abiajn respondojn je miaj demandoj. Jen la vico da ili:

„Ĉu vi interesiĝas, sinjoro ministro, pri lingvo internacia Esperanto?“

„Sendube jes: la afero ŝajnas esti grava kaj necesa en internaciaj rilatoj, tamen bedaŭrinde mi ne havas tempon por studi ĝin detale. Nun la pola ministaro estas tro ŝarĝita per la laboro, kaj mi certe ne havas malpli multe da laboro ol aliaj ministroj.“

„Vi diris, sinjoro ministro, ke laŭ via opinio estas Esperanto grava en internaciaj rilatoj. Ĉu vi bonvolus precizigi en kiuj internaciaj rilatoj Esperanto estas speciale grava?“

„Esperanto povus ludi grandan rolon kiel internacia lingvo de diplomatoj. Tamen tiu ĉi afero ne apartenas al mi, sed al sinjoro ministro por eksterlandaj aferoj. Mi povus nur aludi grandan rolon de helpa lingvo internacia por kultura proksimiĝo de la naciaro kaj por ĝia preciga interkonsento. Tiurilate nepe helpos al Esperanto la tempo, kiu iom post iom laboras ankaŭ por lia interkonsentiĝo.“

„Mi dankas, estimata sinjoro ministro, por tiuj ĉi viaj vortoj. Mi tre ŝatas ilin kaj laŭ ili mi konstatas, ke vi vere favoras la aferon de lingvo internacia. Kiel vi verŝajne scias, antaŭ kelke da monatoj estis anoncita en la oficiala organo de via fako, en gazeto „Gazeta Administracji i Policji Państwowej“ (Gazeto de Administracio kaj ŝtata Policistaro) artikolo porparolanta „Jvokanta oficistojn de via fako por studado de Esperanto. Ĉu vi, sinjoro ministro emas apogi plue la komencitan aferon?“

„Jes, sinjoro. Mia oficistaro, speciale la policistaro, ne povas studi multajn lingvojn. Kvankam mi, kiel ministro por internaj aferoj, devas antaŭ ĉio atenti la ŝtatan, polan lingvon, tamen mi opinias, ke speciale la policistaro, kiu tre ofte peras la krimulojn en diversaj ŝtatoj, devus koni lingvon internacian. Krom tio Esperanto havas laŭ mia opinio la eston econ kiel komuna lingvo de registaroj.“

„Ankaŭ por tiuj ĉi vortoj mi tre dankas vin, sinjoro ministro. Ni Esperantistoj akcentas ĉiam la necesecon de komuna lingvo interregistara. Tamen mi devas akcenti, sinjoro ministro, ke la pola registaro bedaŭrinde ĝis nun tute malzorgis la aferon de Esperanto, dum la registaroj de aliaj landoj, kiel speciale de Ĉeĥoslovakio, Finnlando, Germanio, Hungario, Ĉinio, Japanio kaj aliaj landoj, tre ofte uzas Esperanto por siaj propraj ŝtataj celoj.“

„Jes, vere, vi estas prava. Ni ĝis nun ne interesis multe la afero. En nia eksterlanda pr pagando ni tute ne uzis Esperanton. Sed ĉu vere la oficialaj sferoj eksterlandaj havas emon por Esperanto?“

„Nepe jes, sinjoro ministro. En Ligo de Nacioj la afero de Esperanto estis preparolata en plenara kunsideo kaj en komisiono, kiu nun traludadas la demandon de lingvo internacia. Dektri ŝtatoj, inter ili ankaŭ Polujo, proponis oficiale Esperanton en internaciaj kaj interŝtataj rilatoj; favora (por Esperanto) rezolucio estis akceptita. Mi opinias, ke la pola registaro devas nun ankaŭ tre serioze studi la aferon kaj helpi ĝin.“

„Mi vidas la viron, sinjoro. Oni devus doni al la „Rada Ministrów“ (Ministaro konsilantaro) aran penskribon, klarigantan komplete la aferon de Esperanto. Al la penskribo, kiu devas esti enmanigita en la Prezidejo de Ministraro, oni devas aldoni ĉiujn oficialajn rezoluciojn eksterlandajn por Esperanto, ĉiujn dokumentojn kaj broŝurojn. Tiam la afero certe estos preparolata.“

„Mi zorgos, sinjoro ministro, ke via ŝtata konsilo estu farata. Ankorau unufoje mi tre dankas po la tiom al vi kara tempo, kiun vi afable dediĉis por mi. Ĉu vi permesas, ke la intervido estu presata en la Esperanta gazetaro?“

„Jes, jes, sinjoro,“ respondis ridetante la ministro, „kiel mi rimarkas, vi ĉiam same laboras por Esperanto. Mi deziras al vi feliĉon en via laboro...“

„Mi adiaŭis la efablan ministron, kiun mi jam antaŭ dekkelkaj jaroj havis okazon ekkonni kiel homon tre vaste pensantan. Mi opinias, ke ni, poltaj Esperantistoj, povos multe helpi la disvastigon de Esperanto en Polujo, se ni plenumos la konsilon de la ministro D-ro Kiernik. Varsaviaj samideanoj certe bonvolos prepari la aluditan de la ministro penskribon (memorjalo) kaj doni ĝin al la Prezidanto de la Ministraro. Oni devas ankaŭ preparoli la aferon kun D-ro Głabinski, ministro de lernejoj kaj kun s-o Seyda, ministro por eksterlandaj aferoj. En pola Sejmo ni havas nian samideanon, s-o Arthur Pankratz (germ. socialisto), kiu certe povos multe helpi. Krom tio mi instigis jam por Esperanto seiman deputiton, s-o Bol. Greis (Pola katolika partio popolo). La afero de Esperanto en oficialaj sferoj registaraj kaj ŝtataj estas lia, ke se oni povos konvinki por Esperanto la klubon de Polskis Stronietowca Ludwe (partio de Witos), nia voko povas venki tiel en la sejmo, kiel en registaro, apogata minimume de partio de Witos, de polaj maldekstruloj kaj de „nacia malplimulto“. Tamen speciale mi pezas la varsaviajn samideanojn atenti je s-o ministro D-ro Kiernik. Ne domagu, se kompetentaj poloj kaj la eksterlandaj samideanoj sendus al tiu ĉi ministro leterojn kun enhavo laŭdata liaj opinion koncerne Esperanton. La adreso de la ministro: Sinjoro D-ro Ladislaw Kiernik, ministro por internaj aferoj en Warszawa, Polujo. Bonvolu adresi en Esperanto.“

Leopold Kronenberg.

D-ro Eduard Mybs †

la 4. junio 1923.

Bedaŭrinde neniu samideano en Hamburg sciligis nin pri la morto de una el la plej fervoraj kaj unuaj pioniroj de nia movado: „Esp. Praktiko“ lian nekrologon de Oscar Bünnemann:

La Esperantistaro de la tuta mondo funebra pro la morto de una el la plej fervoraj kaj unuaj pioniroj de nia movado: Sanitistaro D-ro Mybs, la ĉie konata prezidanto de la Kvara Universala Kongreso de Esperanto en Dresden kaj vicprezidanto de la Esperantista Akademio.

Jam antaŭ kelkaj monatoj nia kara samideano pro sia malforta sano ekigis ĉi la Akademio kaj ĉesis ĉeestita kunsideo de la Hamburg-al Esperantistoj. Nun, en sia 65-a jaro, li forlasis nin por ĉiam. La 8-an de junio aro da samideanoj akompanis lian ĉerkon al la tombo en la hejmurbo Altona a. Elbe. Kelkaj paroloj estis dediĉitaj ĉe la malfermita tombo al lia agado inter la Esperantistoj kaj al lia funebra edzino, kiu partoprenadis en liaj intereso kaj beligis lian vivon. Lia juna filo jam de kelka tempo anstataŭas s-an patron en la profesia laboro.

D-ro Mybs, konata en la tuta Esperantista mondo, jam estis Volapükistoj kaj tre fve franisira al la Esperanta movado. Li ofte kun entuziasmo rakontadis pri la unua Esperanta internacia kongreso en Bulonjo, kie li interŝanĝis ĝojplene manpremojn kun anglaj kaj francaj samideanoj, kun la entuziasma ekriko: „Ni komprenas unu la alian!“ Dum multaj jaroj li partoprenis ĉi Universalaĵ Kongresojn de Esperanto, kaj lia larĝa animo de ĉiu kongreso portis helmen impresojn multspecajn, pri kiuj li paroladis en publikaj kaj en intemaj kunidoj ĉiam entuziasmizante la aŭskultantojn. Nobia amikeco ligis lin kun D-ro Zamenhof, kies sentema koro trovis en D-ro Mybs vobranatan ĉion.

En la Lingva Komitato kaj la Akademio D-ro Mybs apartenis al tiu grupo, kiu en kriza tempo havis iuj plenan komprenemon pri la danĝero de reformoj kaj pri la absoluta neceso de unueco kaj firma fideleco al niaj lingvaj tradicioj.

Kiel prezidanto de la Germana Esperanto-Asocio li sialtempe viglege laboradis kaj donis fortan antaŭeniradon al nia movado.

Lia nomo kaj lia nobla karaktero estas gravituroj en nian memoron kaj ĉiam instigos nin al fervoro kaj tekta plena laborgado por nia afero. Al liaj edzino kaj filo ni esprimas nian profundan simpatian kun ilia doloro.

Oscar Bünnemann.

Radio.

Senfadena telefonio kaj Esperanto.

Ni legas en la numero de 25. majo de la franca komerca revuo „Les Echos“ jenan artikolon:

Oni povas esti aŭ ne esti partiano de universala lingvo, — kion oni ne povas nel, estas ke ĝia principo konformas al tiu de sciencaj progresoj. Ĉu senparia homo ne juĝas, ke nia brulanta moderna vivo perdis sian akrecon, se la parolo transdonita tiel rapide per la telefono aŭ senfadena telefono estus ankaŭ rapide komprenata de ĉiuj loĝantoj de la tero? Kion ni bezonas, estas konstanta antaŭeniro al la lumigo; kaj kiu admirinda maniero estas lumigi subite en la spirito de ĉiuj popoloj belajn pensojn, naskigi noblajn pasiojn!

Estus dezirinde ke inter la apostoloj de Esperanto troviĝu iu Vanderbilt, Rockefeller, Cognacq, kiu havigus al sia lando instalacion elmetantan grandan potencon: ĉiutage, senhalte, estus transdonataj en Esperanto al ĉiuj anguloj de la globo interesaj novaĵoj. Ĉu ili dezirus tion aŭ ne, la aŭdantoj estus devigitaj aŭskulti; ne komprenante, ili estus devigitaj elerni la solan lingvon, sub la eventuala puno ne esti plu en la aktualeco. Se oni deziras rememori ke, por kompreni la novan lingvon, oni bezonas apenaŭ kelkajn tagojn kaj, por paroli ĝin, apenaŭ kelkajn semajnojn, oni facile imagos la moralajn kaj intelektajn fruktojn, kiujn baldaŭ el tio eliros la tuta homaro.

PS. Gazetoj responentaj tiun ĉi artikolon, estas petataj sendi ekzemplerojn al la redakcio de „Les Echos“, 2, rue Mariel, Paris 10.

Abonantoj!

Por laŭorde ricevi ĉiujn dum- kaj prikongresajn n-ojn de ET, bonvolu tuj pillongigi vian abonan ĝis minimume n-o 155. Ni liveros nur ĝis la lasta pagita n-o. — Dum la kongreso aperos 5 specialaj n-oj de ET, por kiuj ni deprenos entute 3 n-ojn de la abonkonto.

700.176 - E. Kop.
1923 - 1924
143 - 228

Kroniko.

Fakoj.

Pacifismo.

En la faka kunsido de pacifistoj dum la XIV-a en Helsinko oni decidis fondi specialajn sekciojn de Esperanto pacifistoj en diversaj landoj kun la celo poste kunigi ilin por formi internacian Esperantistan Pacifistan Ligon. Al tiu celo oni ekkonis internacian preparan komitaton. Laŭ instigo de la komitatano D-ro Adolf Bischitzky, de la germana grupo „Verda Stelo“ en Praha, la 8 junio estis fondita Esperanta sekcio de ĉeĥoslovaka paca socio Ĉelĉický. La konstituan kunvenon paŝtoprenis granda nombro da germanaj kaj ĉeĥaj samideanoj el Praha. Kiel reprezentanto de la paca socio Ĉelĉický ĉeestis la kunveno D-ro Rubin, prezidanto de la societo. Li alparolis la kunvenitaron ĉefe kaj germane, eĉ provis kaj laŭdis la fondon de Esperanta sekcio kaj almontris la gravecon de Esperanta lingvo por pacifista movado. D-ro A. Bischitzky feris paroladon pri la esenco de la pacifismo, en kiu li precipe montris la diferencon inter la utopia, malnova ideo de kosmopolitismo, kiu celas forigi la kontraŭecojn inter la homoj, kaj la moderna reala ideo de pacifismo, kiu celas nur konstrui la ponton inter homaj kontraŭecoj pace kaj hominde. La parolanto diferencigas kontraŭecon en pure privataj personaj aferoj (kiuj ofte estas netransportebaj, sed kiun transportigi ne estas necese, kiuj nur postulas toleremon, liberemon kaj estimon de konvinkigo de aliaj personoj) kaj kontraŭecojn en komunaj aferoj, precipe ekonomiaj kaj materialaj (kiuj povas esti transportigataj harmonie, kondiĉe, ke ambaŭ konkurantoj limigas siajn proponajn dezirojn kaj postulojn por la deziroj kaj postuloj de la aliuo). Memlimigado, justeco kaj prudento estas la nepraj principoj de pacifismo en aferoj komunaj. Paca interkonsento inter la homoj en ĉiuj eblaj konfliktoj kondukas al kunigo de fortoj, al ekfloro, progreso de la aferoj, al profito de ĉiuj apartaj personoj: interbatalo kaj perforto sekvigas malŝparon de fortoj, uzon de fortoj al vanaj interbataloj, al ĉiam denovaj preparoj por bataloj kaj ĉiam plene plejofte al ruiniĝo de ambaŭ partioj. Kunlaborado de pacifistoj kaj Esperantistoj devas servi Esperanton al pacifismo kaj reciproke helpi la disvastigon de internacia helpingo Esperanto, montrante la taŭgecon de la lingvo por ĉiuj internaciaj aferoj. Granda aplaŭdo sekvis la paroladon. D-ro Rubin precipe laŭdis la belsonon de la lingvo kaj konfesis, ke li, kvankam ĝis nun neniam lerninte kaj aŭdinte Esperanton, tamen tiel bone komprenis la paroladon, — bonega pruvo de internacieco de la lingvo. — Poste oni elektis estraron. Ĉi tie estas dezirinde, ke ankaŭ en aliaj landoj oni fondu tiajn Esperantajn sekciojn de hejmlandaj pacaĵoj, ĉar nur tiamaniere oni povos plenumi la dezirojn, esprimintajn en Helsinko: la fondon de Internacia Esperantista Pacifista Ligo. Dezirinde estas ankaŭ, ke en Nürnberg dum la XV-a okazu faka kunveno de pacifistoj kiel en Helsinko, dum kiu oni povos daŭrigi la diskutojn pri la fono de la Internacia Ligo. La L. K. K. estas do perata ararigi tian fakajn kunvenojn de pacifistoj kaj nomi la funkcion por ĉi tiu kunveno, al kiu povas iri sin ĉiuj interesigintoj.

Skolfismo.

Esp. kurso en București (Rumanujo).
Post enkondukita konferenco de s-o Henriko Fischer L. K. malfermiĝis kurso la 23.5. en la Skola Domo de București. La kursojn, kiuj partoprenas 32 skolitoj, gvidas s-o Tiberio Morariu. Adreso de la organizito de la kurso — s-o A. Dumitrescu, skolestro, București, Calea Dorobanților 82, Sediul Cercetașilor.

Esperanto ĉe la skoltaj de Besarabio (Rumanio).

En Chișinău (Kiŝenev), ĉefurbo de Besarabio, estas preparata kurso por la skoltaro. Laŭ la iniciato de s-o D. Grünberg, del. de UEA en Tighina, la tieaj skoltistoj unuvoĉe decidis aranĝi porskoltajn kursojn. Precipe favoras kaj subtenas la planon la skoltistoj s-o Mihailov kaj Pușkaș. Ĉar la estro de la tuta Besarabio skoltaro, s-o kolonelo kaj parlamentano Adamovici, plene aprobas la ideon, estas esperate, ke Esperanto ĝeneraliĝos la tuta Besarabio. Por tiu celo laboras nun krom la nomitaj ankaŭ s-o Petro Stoian L. K. (Chișinău, Strada Spital 10) kaj subkolonelo V. Cojocariu, estinta rusa oficiro en Mangurio, nun loĝanta kaj deĵoranta en Tighina (Cercul de Recrutare).

En urbo Tighina (Bender) la komitato de la skolta sekcio „Makkabi“ elektis dekan da plej bonaj skoltaj por fari ilin instruantoj. Laŭ la statuto de la komitato komisiita por tio, neniu el ili povas fari instruantoj, ĝis la perfekta scio de Esperanto. Por tio la komitato malfermis specialan kursojn, kiujn gvidas makabi instruanto s-o Etlis (Tighina, Str. Marășești 185).

Landoj.

Anĝlujo.

18-a Kongreso de Skotaj Esperantistoj.

Sukcesplena Kongreso de Skotaj Esperantistoj organizita de Skota Esp. Federacio okazis en Greenock dum la semajnfino 15-17. junio. 140 kongresanoj ĉeestis el dudek skotaj grupoj kaj urboj. Por akcepti la ĵus alvenintajn gastojn la loka grupo sub la prezido de fino M.E. Hamilton aranĝis belan festeneton en propra grupo. Per aŭtomobilo, sabaton matene, la kongresanoj veturis al Wemyss Bay laŭ la bordoj de la Enfluejo de Clyde, kie troviĝas la plej bela panoramo de montegoj kaj golfetoj videblaj en Britujo. Dum komuna tagmanĝo, kiu okazis posttagmeze oni tustis al „La Tag“ kun amo en la koro al ĉiuj homoj kaj nacioj en la mondo, la tago, kiam „homoj sur la tuta tero fariĝos felicaj kunfratanoj“. En la kunveno de la kongreso post salutoj de la delegitoj sekvis raporto de s-o Tullo pri laboroj de la Konferenco en Venezia. La Federacio elektis kiel prezidanton por la venonta jaro s-on Rodger, Burnisland. Ducent personoj ĉeestis publikitan propagandan kunvenon vespere en la urbodomo. Magistrato Paterson prezidis kaj parolis simpatie pri nia movado. La temoj de la ĉefparoladoj estis „La eduka valoro de Esperanto“ (s-o G. W. Scott, Dunfermline), „Esperanto en Komercio“ (s-o Tullo, Edinburgh), kaj „Kion povas fari Esperanto por mondopaco“ (s-o Page, Edinburgh). Bela koncerto okazis dum la kunveno, en kiu precipe ĉarmis la kantoj de la duetistoj Joyce Brodie kaj Bobby Robertson el Coairbridge. Dimanĉon okazis diservo en la skota episkopa preĝejo de S-ta Johano. Pastro R.F. Strathern predikis, s-oj Warden kaj Harvey legis la bibliojajn.

Greatheart Order of World Friendship. (Grandkoro ordeno de mond-amikeco).

„Greatheart“ estas la nomo de monata gazeto de infanoj de la skotaj presbiterianaj eklezioj. Ĝi havas vastan vendon, pli ol 145000 ekzempleroj ĉiunonate. La redaktoro fondis societon por infanoj, kiu li nomis „Greatheart Order of World Friendship“, mallonge GOWF (elp. „gaŭf“) kies celoj estas jen:

1. Eltrovi pri aliaj rasoj kaj landoj,
2. Korespondi kun la ĉefo,
3. Montri amikecon al fremduloj (al landuloj),
4. Peni lerni fremdajn lingvojn kaj Esperanton,
5. Interesiĝi pri la Ligo de Nacioj,
6. Pensi pri misistoj,
7. Fari objektojn por helpi al allandaj bezonoj,
8. Interesiĝi pri la ordeno dum la tuta vivo.

Dum kelkaj monatoj pli ol 5000 infanoj aliĝis al la ordeno. Ĝis nun malmulte da infanoj en la ordeno povas korespondi en Esperanto sed infanoj, kiuj deziras korespondi anglalingve povas skribi al la ĉefo de GOWF, 22, Queen Street, Edinburgh, aŭ 121, George Street, Edinburgh, Skotlando. Per tiu korespondado oni povos instigi la junajn membrojn lerni Esperanton.

Bulgario.

Debelec apud Tirnovo. Fondiĝis grupo „Botev“ kun 22 membroj.
Kazanlik. Kurso kun 20 p., gvid. Petr. Ivanov. Redondiĝis grupo „Internacia voko“ kun 22 membroj.
Sumen. Kurso por trudovakoj (laborrekrutoj), gvid. P. Georgiev. Fondiĝis junula grupo.
Tatar Pazarĝik. Nova kurso kun 20.
En vilaĝo Kramolin, Kruŝun kaj Suhindol estas Esp. studantoj.



★
La oficiala instruado de Esperanto en bulgaraj lernejoj.

Gelmantoj de VI-a klaso de Miksa Reallernejo en urbo Popovo (Bulgario).

En la unua vico meze la instruanto Pastro Georgi Hristov.



Ĉeĥoslovakio.

Nymburk 9.—10.6. okazis ĉi tie la 14-a laborkunsido de orientbohemiaj Esperantistoj. Ĉeestis nur ĉ. 40 p., ĉar samtempe okazis ekskurso de germanaj kaj ĉeĥaj samideanoj al Malá Skála. — La 9. estis amuza vespero, la 10. aĝm. fakunsido de UEA poste rigardado de la urbo. Komuna tagmanĝo multlokosta sed malbona. Posttagmeze laborkunsido, dum kiu s-o Sklenka prezentis la regionan raporton kaj dum kiu oni praktikis diversajn interesajn aferojn. (Mallongigite laŭ raporto de R. Pivl.)

Ĉinujo.

Pekin. Esp. Asocio fondiĝis la 24.1. en la Universitato de Norda Ĉinujo.
Shanghai. La 25.2. adiaĵa kunveno por s-o Eroŝenko ĉeestis 400 p. — Oficisto de Ĉina Telegrafa Administracio organizis grupon „La Verdo“ kaj kursojn.

Francoj.

Franca komercio kaj Esperanto.

En ET 159 s-o Schade, raportante pri komercista kunveno pri Venezia, peis ke oni sciigi pri simila agado en aliaj landoj. En Francujo la agado jam komencis. La 12.5. okazis en Paris en la ejo de la Franca Societo de Telegrafo, sub prezido de gen. Sebert, la unua publika kunveno de Assoc. por Franca Komercia Disvolvigo per Esperanto (alinoigite de „Komercio kaj Esp.“) Anlaŭ elektita publiko el komercistoj, industriistoj, membroj de la komerca Ĉambro (ĉeestis ankaŭ s-o Pascal, eksprez de Parisa Ĉambro) kaj de Societo de Civilaj Inĝenieroj de Francujo, s-o André Baudet, membro de la k.ĉ., parolis pri utilo de Esperanto por la komercio. La nuna prezidanto estas s-o Deny, inĝ. diplomata de Parisa Centra Lernejo; adreso: 20, rue de l'Arc de Triomphe, Paris 17.

Italujo.

Genova. Lab. Esp. Grupo, Casella Postale 922, dissendas senpage la verkon de Mazzini „Devojo de la Homo“. Oni petu ĝin! La libon oni sendis ankaŭ al la italiaj ministroj kaj ŝtataj subsekretarioj.
Udine. — Fondiĝis grupo, al kiu aliĝis jam 70 personoj.

Jugoslavio.

Novi Listak. — Post favoraj artikoloj en jurnalo „Primorske Novi Listak“ okazis Esp. ekspozicio; 154 publika memorfesto pri Dr. Zamenhof. Funkias 3 kursoj; por fincinstoj, presistoj kaj urbanoj, gvid. Rad. Goldner. Penetoste ekskurso al monto Riŝnjak.

Latvujo.

Riga. Kursoj funkcias ĉe la administracio de la fervoja polico, gvid. A. Krause. La kursojn subvencias la ministerio por interno per 20 latoj monate. — S-o Inte Ĉaĉe propagandas inter blinduloj. — Riga Esp. Soc. aranĝis ciklon de propagandaj ekskursoj, sub gvidado de s-o Andreo Fridenberg. La unua okazis la 6. kun 25 p. al plej bela loko en Latvujo, Sigulda (Segewold), kie — apud rivero Gauja (Livl. Aa) — troviĝas la ruinoj de antikvaj kasteloj Sigulda, Turaida kaj Krimulda. (Ilustraĵo pri tiu ĉi ekskurso aĉeros en via venonta numero.) Dua ekskurso la 1.7. al Koknese sur dekstra bordo de rivero Daugava (Dūna), laŭ invito de s-o generalo Bangerski.

Litovujo.

Kaunas. Laŭ propono de Lit. Esp. As. la urbestro nomis unu el la ŝtataj konsilato de Zamenhof. Oni diras,

ke en tiu ĉi ŝtato troviĝas la domo, en kiu loĝis la boĝepatroj de la maistro, ges-oj Zilbernik.

Mangurio.

Charbin. La plej granda parto de la klubmembroj estas fervojaj oficistoj. Prezidanto kaj UEA-del. estas P. Pavlov. El Ĉita alvenis 250 lernolibroj (Kurbator kaj Taubmann). Vigle agadas pastro Serišev, antaŭ nelonge alveninta el Japanujo. Li aranĝas kursojn, verkas gazetarikolojn ktp.

Polujo.

Pola poŝtistaro por Esperanto.

Bydgoszcz. 17. junio 1922.
Antaŭ nelonge finiĝis en Poznań la III. tupolujia kongreso de poŝtistoj, grupigitaj en unusola por Poŭjo „Związek pracowników Poczy, Telegrafu i Telefonu Rzeczpospolitej Polskiej“ (Asocio de laborantoj de Poŝto, Telegrafo kaj Telefono de Pola Respubliko). La asocio kalkulas 35000 anojn; ĝian kongreson ĉeestis du oficialaj delegitoj de pola poŝta ministerio. Dank' al penado de poŝtista delegitaro el Bydgoszcz (s-o Reichelt, Olekay, Zwierzchowsky) kaj de s-o Prubucki, poŝtstro en Miłosław, kongresa komisiono de rezolucioj akceptis jenajn teksten poresperantan:

1. Konsiderante, ke poŝtaj rilatoj estas internaciaj kaj ke ili bezonas helpon lingvon internacian, la kongreso opinias, ke ĉiu pola poŝtisto devas interesiĝi kaj konantiĝi je lingvo internacia Esperanto.
2. La kongreso dankas la Ministerion de Poŝto kaj Telegrafo pro la apogo de Esperanto en sia oficiala gazeto kaj la Estraron de Asocio pro la oficialaj artikoloj poresperantaj, presataj en organo poŝtista „Poecza“.
3. La kongreso decidis propagandi plue Esperanton inter la polujaj poŝtistoj kaj opinias, ke estas

morela devo de ĉiu pola poŝtisto aĉeti kaj studi „Samozcek Jazyka Esperanto“ (lernolibro), e donitan de prof. Kronenberg. Por pli facila progando la kongreso komis la novan estraron asocian aĉeti 5000 ekz. de la nomita lernolibro kaj disvendi ilin inter la poŝtistaro. L. K.

Svislando.

Lugano. — La kom. ĉambro de Lugano, sekve de la raporto de siaj delegitoj el la konferenco de Venezia, faras klopodojn por enkonduki Esp. en la kantona komerca lernejo de Bellinzona. La raporto de la k.ĉ. pri Venezia aperis en komerca gazeto „Il Commercio“. — En Lugano kaj Bellinzona finiĝis kursoj; ankaŭ en Locarno finiĝis kurso de fino Molinari kun 15 p.

Por „Esp. Ligilo“

ni ricevis ĉekon je 157000 gmk. de Esp. Societo Bern rezulto de kolekto farita post lumbligoparolado de s-o J. Perlet en februaro. La sumon ni iranskalkulos en svedaj kronoj laŭ la tega kurzo ĉe alveno de l' mono.

Flugfolieto.

1. Julio.

Ĝentileco estas la oleo, kiu, same kiel ĉe maŝino, celas, ke la kontakto inter ĝiaj partoj okazu senfroto. Kontaktiĝante kun aliaj, ni homoj estas la partoj, el kiuj konsistas la maŝino de l' trafiko en la plej vasta senco de l' vorto. Ĉu ni Esperantistoj ne havas specialajn motivojn deziro, ke tiu maŝino funkcii senfroto, agrable utilige? Ni do ne ŝparu la oleon! Ĉiam kaj ĉiuokaze ni estu ĝentilaj, kompleksaj; servemaj. Tion farante ni konstatos, ke niaj rilatoj al aliaj homoj — precipe ni konsideru allandanojn — fariĝas agrablaj kaj fruktodonaj. — Kompreneble ni ne cedu al ĉiu deziro nepravigita. Ni pripensu kaj saĝe decidu. Kaj ni ne forgesu, ke dolĉigata „ne“ lafoje efikas pli bone ol senpripensa „jes“, kiun poste oni bedaŭros kaj ne povos plentumi. En dubaj okazoj oni prokrastu la respondon pretekstante, ke necesas pli detalaj informoj. Neniam oni enmiksi personajn aludojn aŭ eĉ ofendojn. Objektiveco en ĉiuj aferoj estas nepre postulinda. Korespondante kun allandano oni evitu politikajn diskutojn, sed vidigu estimon por la propra kaj fremda nacioj. Ne postulu neplenumblajn kompleksaĵojn; anstataŭ peti, prefere donu. Se krom tio vi respektos la ĉie trovblajn „malfortaĵojn“ de la nacio, al kiu apartenas via korespondanto, kaj ne alirados al li tiujn de via lando, vi vidos, kiom bonega rimedo estas Esperanto por ligi amikajn kaj profitigajn rilatojn en la tuta mondo.

Nia XV-a estas proksimiĝanta. Kion ni diris pri skribaj rilatoj, tiom pli valoras por personaj. Tion ni memoru dum la granda kunveno en Nürnberg.

Zanoni.



Madona Preĝejo.

Kongresaj Diservoj en la XV-a.

Laŭ tradicio okazos ankaŭ en la XV-a oficialaj Esp. Diservoj por la ĉefaj konfesioj. Konsiderante la gravecon de Esperanto por religiaj celadoj, la Nürnbergaj Estraroj komplezeme disponigis la proponitajn de L. K. K. preĝejojn, kiuj certe prezentos indan kadron por la diversaj aranĝoj.

La protestanta diservo okazos en la S-ta Sebalda Katedralo, unu el la plej belaj preĝejoj de Germanujo. Ĝia historio estas ligita kun la legendo de la S-ta Sebaldo, kiu trovis ĉi tie la lastan ripozejon kaj ekfiks laŭdire tiom da mirakloj, ke multaj miloj pilgrimadis ĉiujare al lia tombo. La origina kapelo, konstruita en la 10-a jarcento, baldaŭ jam ne sufiĉis, kaj tial la urbestro, subvenciata de malavara loĝantaro, plivastigis respektive novkonstruigis la sanktejon. Tio okazis en la jaroj 1300—1373, pro kio la konstruaĵo vidigas la evoluigon de la tuta germana arkitekturo, la solenecon kaj malhelecon de la gotika, la fantazian elegantecon de la maŭra, la grandiozecon kaj majestecon de la saksa-normana stiloj kune kun la gracieco kaj prabeleco de la antika kolona sistemo. Same kiel viva atestanto pri la varma, sankta, persistema sentado de tiu epoko, ĝi staras kun siaj monumentaj rimarkindaj epokoj antaŭ niaj admirantaj okuloj. Fiere superstaras la du graciaj turoj de la belega templo la domaron de la antikva „Noris“. La eksteraĵo de la preĝejo estas ornamita per multaj interesaj, monumentaj, reliefoj, kaj statuoj. Enirinte ni admiras la belan simetron de la arkitekturo. La ĉielarko, apogata de 22 kolonoj, kaj la magika lumo, kaŭzata de la belkoloraj kolosaj fenestroj, estigas ĉe ĉiu meditado kaj admiradon. Inter la multaj majstraĵoj, kiuj ornamas la internon, troviĝas la mondfama tombo de S-ta Sebaldo; verkita de la bronzfandisto Peter Vischer kaj liaj filoj 1508—1519. Prave ĝi estas ŝatata de ĉiuj artistoj kaj artamantoj. La kompozicio estas elpensita laŭ spirito kaj pieco de tiu tempo, al kiu ĝi dankas sian devenon. Ĝi formas kvazaŭ kapelon, en kies mezo ekstarigas argentladumita ligna ĉerko, enhavanta la relikvion de la sanktulo.

Kiel predikanto funkcios s-o Superintendento D-ro Kühn el Auerbach, kiu jam predikis en nia IV-a. La muzikon kaj kantojn prezentos la seminarianoj el Auerbach, anoj de la tiea Esp. Lernejo. Aparta belilustrita programo estos eldonata de konata mecenao.

La katolikoj diservos en la honorinda Madona Preĝejo. Konstruita 1355—61 ĝi estas vere gotika juvelo. Limigante oriente la ĉeffoiron, ĝi estas la ĉefa ornamo de tiu ĉi grandioza placo, des pli ke ĉiuj figuroj kaj turetoj abunde estas amasigataj ĉe la fronto. Super la belega portalo troviĝas la 1509 finkonstruita arteca horloĝa mekanismo. Ĝi prezentas la imperiestron Karolo IV-a, liajn heroldojn kaj la 7 elektoprincojn, kaj estas populare nomata „Hometa Kurado“; ĉar precize je tagmezo la elektoprincoj ĉirkaŭmarŝas la sidantan imperiestron, dum la heroldoj trombonas — spektaklo, kiun neniu fremdulo malatentas. El la internaj artaĵoj ni mencias speciale la ĉefaltaron, ornamitan de freskoloraj pentraĵoj; kies fantaziema, pasiema, bedaŭre nekona majstro estis unu el la grandaj pioniroj de la niŭberga pentroarto. Du ŝtonaj epitafoj apartenas al la plej maturaj verkoj de Adam Krafft.

Solena Meso estos legata, kiun asistos diversnaciaj pastroj. La predikon bonvolos preni sur sin Eklezia Konsilisto Eduard Becker el Breslau. Ankaŭ la relative novkonstruita (1874) sinagogo, kie okazos la hebrea diservo, estas ornamo de la urbo, inda al la aliaj temploj. Situante ĉe Hans-Sachs-Placo, la impona konstruaĵo jam de malproksime vidigas per siaj kvin kupoloj. Enhavante 546 sidlokojn per siaj kvin kupoloj, ĝi montras belajn ornamaĵojn sen ĝenaj pompo kaj troŝarĝo. Kontraŭ oriento troviĝas la „Sanc-

tissimum“, la ejo por la Sankta Kesto kaj la Thora-tekstoj, ornamita per arabeskoj sur blanka fundo. Oraj enskriboj prezentigas ankaŭ hebrelingvaj sur ambaŭ flankaj pordoj kaj sur la belega kurteno, kiu kovras la mezan enirejon. Antaŭ ĝi pendas la lampo kun la „Eterna Lumo“. Kontraŭe estas bela orgeno laŭ la stilo de la tuta konstruaĵo, kies laŭteĝaj belsonaj tonoj plenigas la vastan sanktejon.


La predikanto de tiu ĉi diservo estos s-o Rabeno F. Saphra, rektoro en Annaberg (Sakso), kiu jam funkcias en Krakow kaj Bern. „Paco“ estos la aktuala temo, per kiu li edifos siajn aŭskultantojn.

D-ro R. Ledermann.

La S-ta Johano-Tombejo en Nürnberg.

Kio estas la „Campo Santo“ por Verona, tio estas S-ta Johano-Tombejo por Nürnberg. Ĝi estas ne nur plej bela tombejo de Nürnberg, de Bavario kaj de Germanio, sed eble la plej memorinda tombejo, kiun posedas la homaro. Pro tio estas certe nur malmultaj vizitantoj al Nürnberg, kiuj post raviga migrado tra la belega „Noris“ ne pilgrimas al tiu ejo, kaj vere nenio povus finiĝi pli harmonie la tutimpreson de la urbbildo ol pilgrimado al ĉi tiu mortujo.

Jam la vojo, kiu post la kastelo kondukas al la tombejo, prezentas al ni vidindaĵon. Estas la tiel nomataj „sep stacioj“ de la fama skulptisto Adam Krafft, kiuj sur reliefaĵ murkolonoj montras la ĉefscenojn de la martira iro al Golgatha. La prezentitaj grupaĵoj estas samgrandiozaj kiel emociigaj kaj faras pro sia originaleca percepto



Tombo de Albrecht Dürer.

eksterordinare profundan impreson al ĉiu rigardanto.

Enirante la vizitanto estas surprizata unuamomente per la stranga, eble seniluziiga aspekto. Nenia floroj fortrompas afable la severan destinton de tiu ĉi pacojo. Kelke da grandaj nigraj cipresoj kaj verdaj salikoj kun dependaj branĉoj, — cetera la okulo ekvidas nur kampon dense surmetitan per grizaj sabloŝtonoj: vera ŝtonegaro. Sed tiu ĉi unua impresado baldaŭ aliĝas, kiam ni eniras kaj trapaŝas la vicajn da tomboj, rigardante la artecajn epitafojn, kiuj indikas per emblemoj kaj blazonoj rangon kaj nomon de la pacaj dormantoj.

Ĉiujn famajn gentojn, kiuj sidis iam honestaj kaj fortaj en la urba magistrato, ĉiujn grandajn niŭbergaĵojn kiuj bonfamigis la urbon kiel komercistoj, artistoj kaj poetoj — ĉiujn ni retrovas ĉi tie. Meditemaj ni staras ĉe la tomboj, en kiuj ili ripozadas post agema vivado. Jen la honorinda tombo de Albrecht Dürer, sanktejo por ĉiu artisto. Ĝi enhavas la plej grandan filon de Nürnberg, kiu vivante jam estis en la plej diversaj kampoj ornamo de sia gepatra urbo kaj mortinte ankoraŭ popularigis por ĉiam ĝian nomon en la mondo. Jam de malproksima videbla per pupitra ŝvelaĵo, la simpla senornama ŝtono montras la surskribon:

Me(moriae) Al(berti) Du(leri). Quid- quid Alberti Dureri mortale fuit, sub hoc conditur tumulo: emigravit VI Idus Aprilis MDXXVIII.

(Al la memoro de Albrecht Dürer. Kio estis mortema de Albrecht Dürer, tio ripozas en tiu ĉi tombo. Li mortis la 6-an de aprilo 1528).

Jen la lasta senĉapla saluto de lia fama amiko, scienculo, kaj humanisto Willibald Pirk-

heimer, kiun kronumis iam en la kastelo de Nürnberg la imperiestro Maksimiliano. Proksime al la tombo de Dürer ankaŭ li trovis sian finan ripozejon.

Kaj tute najbare, Veit Stoss, la majstra lignoskulptisto, kies „Anĝelo-Saluton“ ni admiris en la S-ta Laŭrenca Katedralo, atendas gajan reviviĝon.

Tramigrante la tombejon, ni alvenas al la kapelo de la mortintoj, kiu enhavas la lastan verkajon de Adam Krafft: la grandiozan „entombigo de Kristo“, kiu prezentas en siaj latinaturaj figuraĵoj grupaĵojn kortuŝan. Ĝi estis lia cigna kantaĵo. Fininte ĝin, li ripozmetis sian lacan kapon en tiun ĉi pacan ejon enmeze de siaj majstraĵoj. Vane serĉas la okulo hodiaŭ lian tombon, kiun dankeme kaj respektplene alpaŝi ĉiu ŝatus.

Kaj plua tombo, kiun ĉiu demandas: tiu de la poeziisto Hans Sachs, kiu same ripozadas ĉi tie post longa tera migrado. Per siaj kantoj li gajnis la korojn de sia popolo, entuziasme li saluis la matenruĝon de la nova epoko kaj eĉ al nia tempo neniu el la multaj karakterizfamaĵoj estis pli proksima ol tiu bravulo, kiun Richard Wagner redonacis al ni en siaj „Majstrokanistoj“ kiel homon, kantiston kaj poeton, sunumitan de mezepoka brilego kaj de malnova niŭberga gloro.

Ĉiujare, kiam la somera solstico proksimiĝas, la dankema loĝantaro piece ornamas la ripozejon de siaj granduloj. Tiam la vasta mortejo similas florantan rozejon, kaj la melankolio de la grizaj ŝtonoj kaŝiĝas post la brilaj koloroj de la amajoj.

Dr. Richard Ledermann.

Arto.

Nia kunlaboranto s-o Dr. Kleider raportas al ni pri unika artaĵo. Tio estas bildo komponita el miloj da papilaj flugiloj kaj sercas kolora belegeco. La kompono estas tiom delikata, ke unuavide oni opinias havi antaŭ si pentraĵon. Laŭ la kritikoj de fakuloj nenie ekzistas simila artaĵo.

La profesoro de arhistorio Dr. Réé nomas la bildon unikajo de la arto, tekniko kaj belegeco. La nuntempe en la armetia lernejo en Nürnberg instruanta profesoro Braig skribas:

Rara artaĵo.


En la tuta arto ne ekzistas io pli gaja ol la kreitaĵoj de l' rokoko. Sekvante al la peza kaj belega stilo de l' baroko, ĝi estis ties bonega aliĝo. Barokaj epokoj sin prezentas precize limigitaj kaj arkitekture fiksitaj. La mebloj staras en peza amplekso kaj kun fortaj sveloj. La vestoj de la homoj laŭ siaj abundaj kaj masivaj formoj kaj koloroj volas atribui al siaj posedantoj la esprimon de sekereco kaj indeco.

En la plua evoluado, jam en la unuaj jardekoj de l' 18-a jarcento, venas transiĝo. La ejoj perdas sian konstruitan kaj limigitan karakteron, kaj malaperas la arkitekturaj fortolitoj. Ĉe la muroj la tuta geometrio cedas al plej libera vigleco de l' supraĵo. Helokoloraj murkampoj ĉirkaŭsaltataj de la serena ludo de svingigantaj spiralaĵoj. Ĉe la mebloj regas la eleganta kaj fleksebla kurvo kaj la brilo de l' poluraĵoj sur p' eklektitaj lignoj el ĉiuj landoj de la mondo. En la facilajn prismojn de la lustro multenombraj kandelaj lumoj jetas delikatan sprucfajron, kaj la speguloj ĉe la muroj kaj la spegulo de la pargeta planko rebribas nesatigeble pliiĝante la belegecon de la ejo. Tie regas la impresoj de l' senlumo, kaj la homoj en la noblaj malpezaj koloroj de siaj silikaj vestoj, en la harmonio de l' pudro, kun la galantaj gestoj tute estas sindonaj al la goĵo de l' ĝuanta okulo.

Oni devas povl posentiti tiun ĉi avidon je la ĉarmo de l' supraĵoj, volante kompreni, pro kio nun estas ŝatata kaj serĉata la peŝtelpen rado kun siaj delikataj kvazaŭ spirsimilaj efikoj. Saine ĝi estas subdividita de la polve delikata naturo de la papilaj flugiloj kaj sercas ilian noblan brilaĵon. Ne mire, ke fine oni ekpensis pri tio, uzaj la papilajn flugilojn mem kiel bildmaterialon kaj kune kun submetitaj koloroj, oraj kaj argentaj folioj sur la fundo de la vitro kunigi ilin por plej abundaj bildfildoj. Niŭberga artsatanto Julius Luber konservas jam malofat ateston de serena Rokoko-arto en bildo (grando 36:42 cm), prezentanta „Jozefon kaj liajn fratinojn“.

Sub la belega kolona grupo de la salono maldekstre staras la alta trono, de sur kiu Jozefo estas leviginta, por amplete kontraŭi al la pentante sindonaj fratinoj. Benjamin, la plej juna, ĉime me alproksimiĝis al li, kaj ĉiuj aliaj sur la alia flanko restas en plej humila sintonado.

La plej fortaj koloraj notoj eksonas en la nobla ruĝo de l' baldakeno kaj en la hela flavo de l' tapiŝo, al kiu dekstre supre respondas drapiraĵo, svingiganta super kolonoj kaj kornicoj. La movataj formoj de la trono apud ŝparema kaj frankvila brunverda ekbrilas kiel oro kaj argento, eklumantaj ankaŭ en la vesto de Jozefo kaj en la kornico kaj kapituloj de la kolonoj. Nigra panelo de la muroj kuŝas inter varmbunaj pilastroj kaj la serena aranĝita trabaro. En tiuj pendas speguloj kun argenta brilo, enkadrigitaj per p' serenaj spiralaĵoj. En la kahela planko alternas verdeflavaj kun velurbune marmorigitaj kampoj. Larĝa, ornamita rubando, enigita laŭ kuraga vervo, al la antaŭaĵo atribuas kadron kaj apogon. La figuroj de la fratinoj endorigas sin al la tutaĵo en multspecaj kaj trunkvilaj koloroj. La vizaĝoj estas surmetitaj al la bonega bazo kiel vigla kaj iamen delikata pentraĵo. Ĉiu



Sinagogo.

desegno estas farita en vigle movataj nigraj penikstrekoj. Ĝi havas tiun abundan kaj esprimplenan manieron, kia estas individua al la frua 18-a jarcento.

La viro de la bazo ekfiks tra liaj surmetaĵoj de farboj kaj folioj, plintensigante ilian lumforton same kiel la vitra plato surmetita por ŝirmo. La unuan fojon aidante pri papilaj flugiloj, pri oro kaj arĝento kiel pentraj rimedoj, facile oni dezirus pensi pri abomena devojigo de la formanta volo, kia jam ofte en barbara maniero furiozis per bildaj himnoidoj. Ĉar la papilaro prezentas senfinan skalon de koloroj; kaj kiu senlime volas elcerpi ilin por unu bildo, tiu fordonas ĝin al la haoso kaj al la sovaĝigo. Sed en nia bildo la plej bela precize devenas el la nobla elektema sinreĝeno, per kiu ĉio — movata desegnaĵo kaj lumantaj koloroj — estas aranĝitaj por vera muzika eksonado. En tiu ĉi unika verko kun itala stampo, kiun ĉirkaŭas la origina kadro, la efiko de la pozitivita pentrado ankoraŭ multe estas superataj. Ĝia lumado ĝin faras dekoracia parada ekzemplero. La riska kolora ludo en ĝi tute kvietigita estas de vere artistia enhavo kaj de la forto de malnova kaj nobla kulturo.

S-o Dr. Kleider, Nürnberg, Kaisersr. 7, volonte donos plajn informojn al interesatoj (por respondo oni bonvolu aldoni respond-kuponon). La traduko de la Braig'a artikolo kaj ĝia diskonigo en la nacilingvaj gazetoj estas petataj.

Por la XV-a Kongreso de Esperanto en Nürnberg.

Germana spirito, germana koro.

Mi estas danka franco. Mi ĉerpis profiton el la germanaj kvalitoj; mi deziras trovi iam sufiĉe da tempo por diri detale, kiaj ili estas.

Provizore mi rememorigis mallonge la grandajn servojn, kiujn la homa penso ricevis de la germana spirito. Luther liberigis la homan penson. Per la presarto de Gutenberg la liberigita homa penso povis dissemiĝi. Kant difinis la valoron de la homa penso. Goethe determinis la rangon, kiuj apartenas al la homa penso rilate al la ago. Pensi estas la perilo, arto kaj moralo estas la celo. El tio rezultis germanaj ecoj, germanaj aĵoj, kiuj fariĝis homaraj bignoj: metodoj, disciplino, ordigo, iniciativo, asocio, kunigado, kotizado ktp.

Mi same rememorigas la enviindan esencon de la germana koro. La germana vorto *Gemütlichkeit* ne estas tradukebla al aliaj lingvoj. Neniu lingvo enhavas vorton egalsencan al *Gemütlichkeit*. Pro tio estas malfacile klarigi al fremduloj ĝian signifon. Por kompreni ĝin estas preskaŭ necese vivadi en Germanujo. Fremdulojn la franco regalas en la kafejo, neofte en sia familio; por eniri la anglan familion fremdulo bezonas rekomandan leteron aŭ prezenton; en Germanlando al homo, kiu estas senhejma, tre facile malfermiĝas hejmoj; tio estas *Gemütlichkeit*. Malbonuloj ne havas kantojn, diras la Germanoj, kaj ili ĉiuj kantas pro *Gemütlichkeit*. En la tuta Würtemberg, laŭ poezajo, Grafo Eberhardt povis meti sendanĝere sian kapon sur la brusto de sia ajn loĝanto: en tio estis *Gemütlichkeit*. Certe en ĉiuj landoj okazas familifestoj, sed en neniu ili fariĝas tiel plenaj, tiel ĝeneralaj, tiel senesceptaj kiel en Germanujo pri la naskotago de kristo, de la gepatroj, de la gefiloj, de la gefratoj: tio estas *Gemütlichkeit*. Antaŭ unu jaro mi kondukis perseperante karavanon en Germanujo tra München, Nürnberg, Dresden, Berlin, Potsdam, Hamburg Bedaŭrinde la francaj turistoj ne komprenis sufiĉe Esperanton por paroladi kun siaj germanaj samideanoj. Kio sekve okazis? Ĉu vi opinias, ke ambaŭ flankoj restadis senmovaj, stonigitaj, sin reciproke rigardante? Ne, post kelkaj minutoj ĉiuj fratiĝis dank' al la germana *Gemütlichkeit*.

Prof. Roy, Direktoro de „La Caravane“, Gaillac-sur-Tarn (Francujo).

4-a Aŭstralazia Esp. Kongreso en Sydney.

Aranĝi kongresojn en Aŭstralio estas malfacila afero. La distancoj disigantaj ĉefurbojn kaj grupojn estas tre grandaj. Melbourne (la plej proksima urbo al Sidney) estas per trajno 592 mejlojn (955 km) malproksima, Brisbane (1150 km), Adelaide (1730 km), Perth (4445 km), kaj Nov-Zelando (2011 km) en aera linio. Spite tion, entuziasmaj samideanoj venis el ĉiuj flankoj, eĉ Okcident-Aŭstralianoj kaj Nov-Zelandoj ne mankis. Kompare kun eŭropaj kongresoj la nia ŝajnas malgranda pikniko, t. e. laŭ nombro — ni havis nur 70 kongresanojn —, sed la komitato estis tre kontenta pri tiom da vizitantoj.

De amuzaj, negocaj, propagandaj aŭ financaj vidpunktoj la kongreso estis bonsukceso, kaj la „Sidneja Esperanto-Societo“ jam enskribis kelkajn novajn membrojn. Anstataŭ raportoj ni publikigis kelkajn eliraĵojn el la ĵurnaloj de Sydney.

El „Daily Mail“ 3. aprilo 1923.

Estas bona afero esti Esperantisto sur la haveno en ŝtata ŝalupo „Premier“ — inter anoj de „Internacia“ lingvosistoj.

Certe ŝajnis tiel hieraŭ. Dum la eleganta kaj komforta ŝipeto iris tien kaj reen, inter ridantaj, brilantaj bajetoj kaj ĉirkaŭ rokoj, smerald-

verdaj punktoj, la aro de pli ol 60 babiladis kaj kantadis kun riĉaj ital-similaj vokaloj kaj klaraj konsonantoj de sia internacia lingvo.

Delegitoj el aliaj ŝtatoj paroladis kun popoloj de alia nacieco kaj kun Sydney-aj membroj — ĉar inter la grupo de liberemuloj estis holandano, estono, svedo, ruso, germano kaj ĉeĥo. Ĉiuj parolis Esperanton kun granda rapideco — kaj estis ĝojaj. Oni ne povis malkompreni tion.

Ĉe Melbourne'aj vizitantoj sin detenis diri en supera tono pri la haveno: „Jes, estis sufiĉe bela“, kiel tradicia Melbourne'ano kutime diras.

Kontraŭe, ili ekriis: „La haveno estas tre beleaga“, kion oni tradukas (angle) per „The harbour is exceedingly beautiful“. Kaj ili diris ĝin kun emfazo.

(Noto: Inter Sydney kaj Melbourne ekzistas iam delonge amika rivalado pri konstruado, situacio kaj beleco de la haveno de la du ŝtatoj, kaj itaj la ĵurnalistoj — kiu mem partoprenis la ekskurson kaj ne estis Esperantisto kaptis la okazon montri la harmonian interkonsenton de la nuna festo. Li daŭrigas.)

La Internacia spirito de Esperanto ŝajne jam sukcesis forpeli interŝtatajn jaluzojn — inter Esperantistoj.

Nun, se la „Internacia helpilgovo“ tion faris, ĝi faris ion, kion aŭstralianoj alie iakso.

El „Sydney Morning Herald“ 5. aprilo 1923.

(La plej grava ĵurnalo en Nova Sud-Kimrujo, sed tre zorga kaj preciza).

D-ro Scott Fletscher, estro de Wesley Kolegio, Sydney Universitato, kiu prezidis ĉe la malfermo de la Internacia Esperanta konferenco en la Edukada Departemento hieraŭ matene, esprimis sian laŭdon pri Esperanto kiel praktika mondlingvo.

Li diris, ke la mondo staras antaŭ tagiĝo de mirinda epoko, kaj la sentoj de ĉiu studento devus pikigiĝi pro la gloriĝaj perspektivoj. Li longe pritrakis la kritikajn fazojn de homa progreso, kiuj (li diris) komencis kun elparolo por nura nomado de objektoj kaj per grada evoluado oni esprimis pensojn kaj ideojn. Li kredis, ke oni havas en Esperanto ne arlan sed vivantan lingvon, universale komprenatan kaj ĝuetan. Nur unu generacio ĝi faris sian vojon, kaj la atingata sukceso estis montrita ĉe la grandaj internaciaj Esp. kongresoj, kiuj jare okazis de 1905 ĝis 1915 kaj rekomencis post la milito. Ĉe la lasta konferenco delegitoj de 40 diversaj nacioj kunvenis kaj dum plena semajno kondukis siajn negocajn kaj sociajn festojn nur per Esperanto.

S-ino Dale, kiu ĉeestis la konferencojn de la Ligo de Nacioj en Genevo kiel oficiala reprezentantino de Aŭstralio, diris ke la akcepto de la raporto priparolita de D-ro Scott Fletcher kaŭzis multe da diskutado, ĉar oni kredis, ke estis klopodo por anstataŭigi englan kaj francan kiel diplomatajn lingvojn, sed tiuj malfacilaĵoj venkiĝis, kiam oni klarigis, ke oni nur deziras ĝin kiel internacian helpilgvon.

S-o A. M. Graham (prezidinto de la Asocio por Komercaj Vojaĝistoj) diris, ke li reprezentas la prezidanton, kiu mem ĉeestas konferencojn de lia asocio en Brisbane, esprimis deziron, ke oni pilfaciligos la lernadon de Esperanto en lernejoj.

S-o J. M. Edmonds (instruisto en gimnazio) diris ke, kvankam la Edukada Departemento nuntempe ne oficiale aligas Esperanton, oni permesos ĝin (li kredis) antaŭ ol la jaro estos pasinta.

S-o P. J. Bennet diris, ke li kiel sekretario de la Lernestra Asocio kaj kiel instruisto povas certigi la konferencojn, ke la Ministro de Edukado kaj la Subsekretario de la Departemento konsideras la alprenadon de Esperanto kiel laŭvola lingvo en certaj lernejoj, kaj li esperas havigi favoran respondon al la peto de instruistoj por permesi instruon de Esperanto.

(Noto: Malgraŭ tiuj antaŭdiraj la Ministro donis malfavoran respondon al deputitaro de kongresanoj kelkajn tagojn poste.)

Oni elektis s-on C. W. Ballard el Melbourne kiel prezidanton.

El „Sydney Morning Herald“, 5. aprilo 1923.

Al la delegitoj de la Esperanta Kongreso la urbdomestro (ĉefkonsilanto Gilpin) donis civitan bonvenon en la urbdomo hieraŭ, dum li esprimis sian kredon, ke la kongreso havos utilan efikon, kvankam kelkaj kredis, ke Esperanto nur estas manieto. Por diversnaciaj scienculoj ĝi estas gravega, ĉar ĝi ebligis al ili diskuti sciencajn temojn sur unu nivelo. La ordinara komercisto apenaŭ havas sufiĉe da tempo studi Esperanton, sed por komerco estus vera bono, se Esperanto ĝeneraligus.

La prezidanto de la societo (kongreso) — s-o C. W. Ballard — respondante diris, ke Esperanto tute ne estas manieto. La ideo ne estas universala lingvo, sed, ke ĉiu persono estu amano kaj studento de sia propra lingvo kaj ke oni ankaŭ parolu Esperante por ke du renkontantaj homoj en iu ajn terparto povu facile interparoladi. Fundamente Esperanto estas eduka kaj filantropia institucio.

D-ro F. C. Williams el Melbourne proponite toston al la urbdomestro diris, ke post penigaj laborhorj li trovis distraĵojn en Esperanto kaj ofte rekomendis ĝin al siaj pentoj.

La delegitoj honoris la toston per kantado de „Li estas bonegulo“ en Esperanto.

Kiam la kongreso daŭriĝis en la Kunveneja Halo de la Edukada Departemento sub prezido de s-o Ballard, oni atemigis, ke kabloj kaj telegramoj en Esperanta lingvo estis pagigataj laŭ sama tarifoj, kiel kodaj komunikadoj. Oni decidis peti la Ministron de la Poŝto doni la samajn privilegiojn en Aŭstralio, kiuj ekzistas en aliaj landoj, kaj permesi Esperantan telegrafadon je sama kosto kiel aliajn lingvojn.

La propono de s-o A. Saar (Okcidenta Aŭstralio) oni decidis intervjui „Amalgamated Wireless, Limited“ (Unuigata Senfadena Kompanio) pri disvastiĝo de mallongaj, trafaj paroladoj pri Esperanto.

Estis dirite, ke ekzistas 5000 lernantoj de Esperanto en Aŭstralio. En Viktorio 120 ŝtataj ĝeinstruistoj lernas la lingvon, kaj kelkaj el ili instruas memvolajn klasojn. Ĵurnalo estas monate eldonata, kaj oni faras prepaŝojn instrui blindulojn.

Proksima kongreso okazos en Melbourne dum pasko 1925.

Internacia Aerovojaĝa Kongreso.

Ĉi tiu kongreso, la plej grava aerovojaĝa afero de la jaro, okazos en London, en la Institution of Civil Engineers, Great George-Street, Westminster, de 25.—30. junio. La reĝido malfermos ĝin, kaj ĝi estos sub la prezidanteco de la dua reĝido. La suba ŝtatestro pri Aero faras la komencan paroladon, kaj Sir Samuel Hoare, la ŝtatestro pri Aero, la finan.

Laŭ „The Observer“, London, 10. 6. 23.

Ekonomio de Italio laŭ la parolado de Finanzministro De Stefani.

La 15-an de majo en Milano la itala financo-ministro paroladis en „Teatro la Scala“ al nombregaj da financuloj, ekonomistoj, politikuloj kaj alia publiko pri la financaj kondiĉoj de la regno kaj pri la ekonomia situacio, akcentante la rezultojn atingitajn kaj difinitajn por la estonto per la leĝfara kaj administra agado de la fascista registaro.

Evidentiĝis per tio, ke la suprenleviĝo de ambaŭ financo kaj ekonomio de la regno ekantieniris de meze de 1921 kaj fariĝis ankoraŭ pli decidema kaj garantiata energie per la nova politika enlanda situacio.

Pri financo ni ne parolos ĉi tie. Nur ni sciigu la resumon tiel ke dum la antaŭbudĝeto por administra jaro 1925—1924 prezentita novembro 1922 de morinta Ministro Tangorra kalkulis deficiton de 5286 milionoj da liroj, la renovigita antaŭbudĝeto por sama jaro donas realan deficiton nur de 1187 milionoj da liroj kaj efektivan deficiton de 2616 milionoj da liroj.

La parolado estis publikigata kun dika volumo da aldonoj, el kies parto rilatanta ekonomion ni povas ĉerpi iajn karakterizajn ciferojn.

La komerca balanco en 1921 kaj 1922 prezentigas jene:

	1921	1922	diferenco
Importo (milionoj da liroj)	17267	15728	— 1539
Eksporto	8275	9293	+ 1018
Diferenco (Plio de importoj)	8992	6435	— 2557

(Pliiboniĝo de komerca balanco)

Pri komerca ŝiparo interesos jenaj ciferoj (1-an de januaro):

Jaro	Ŝipoj nombro	Malneta enhavebleco tunoj
1914	644	1534758
1922	856	2484182
1923	880	2707957

Inter la marnacioj Italio estis

1914 6-a loko	post Gr. Brit., Germanujo, Francujo, UŜA, Japanujo.
1922 5-a loko	post Gr. Brit., UŜA, Francujo, Japanujo.
kresko 1914—1922 5-a loko	post UŜA, Japanujo, Norvegiujo, Francujo.

Fervojaj enspezoj (malnete) estis (krom la teritorioj noveaneksitaj):

1919—1920	milionoj da liroj	2007
1920—1921		3021
1921—1922		3055

Pri landa produktado precipaj ciferoj estas:

	1921	1922
terkulturo miloj da milkilogr.		
Tritiko	5248	4399
Maizo	2345	1950
Rizo	471	464
Terpomoj	1588	1462
Betoj	1751	2257
Vinburoj	5006	5654
Olefruktoj	926	1582
Citronoj	613	?

Inter la minejaj produktaroj karakterize:

	1921	1922
	milkilogr.	
Fermineraloj	279478	416400
Fera pirito	447899	496500
Hidrargo	1071	1550
Fosilaj brulaĵoj	1145501	902520
Sulfuro	273872	171800
Marmoro	278550	357000

Inter la metalindustria produktaro rimarku:

	1921	1922	
Gizo	milkilogr.	62100	91400
Ŝtalo		700455	943000
Mara salo		422820	?

Specialaj industrioj:

	1920—1921	1921—1922
Alkoholo centlitroj	471000	519000
Biero	1157024	1459555
Sukero milkilogr.	129591	206396
Lumgaso milionoj m ³	217	280 ?
Elektro milionoj hw	40219	?

Bedaŭrinde ni ne povas doni sciigojn pri la aliaj ĉefaj industrioj de la lando, t. e. la mekanikaj, teksaj, mangajaj, muela, lignaja ktp. Ni finu nur per rimarko pri la senlaboreca demando.

La maksimumon de senlaboreca Italio atingis la 1-an de februaro 1922 per nombro de 606819 senlaboruloj, duoniĝis en aŭgusto kaj la 1-an de februaro 1923 estis 381968. La lasta havebla cifero estis de la 1-a de aprilo kaj montris 280701 senlaborulojn, kaj, kompreneble, la malgresado daŭras.

D-ro Umberto Toschi.

Por Distrado.

Mi konvinke kredas, ke scienco kaj paco venkos ne-scion kaj milifon, ke la popoloj interkonsentos, ne por detruŝi sed por konstrui, kaj ke la estonteco apartenos al tiuj, kiuj estos plej multe farintaj por la suferanta homaro.

Louis Pasteur.

Du deziroj.

de N. Hohlov, Zagreb.

En la kursejo de la Esperantista societo en N. regas milda duonlumo. La elektraj lampetoj de la lustro pendanta mezpalfone estas kovritaj per verdaj diafanaj ŝirmiloj, kaj ilia lumo trafas nur kelkajn simetrie starigitajn tablojn. Du aŭ tri dekoj da diversaj kursanoj sidas ĉirkaŭ la tabloj. Sur la tablo de la kursgvidanto staras aparta lampeto kun duongloba ŝirmilo kaj ĝia lumo falas sur la malsuprajn partojn de statistikaj kartoj, tabeloj kun la gramatikaj reguloj kaj geografiak kartoj, pendigitaj sur la muro. En la mezo de l' muro vidiĝas granda portreto de la Majstro. Du verdaj flagoj, orname tuŝante ĝian kadron, etendiĝas malsupren per molaj faldoj.

La kursgvidanto, bela alia blondulo, kun revemaj grize-bluj okuloj, klarigas al la aŭskultantaro la internan ideon de la Esperanta movado. Li mem videble profunde kredas je ĝia ideala beleco. Li estas kaprita de tiu sento, kaj lia instruo sonas kiel prediko:

... La amo, ardanta fratamo, gvidos la estontajn generaciojn. Sur tiu fundamento oni konstruos la regnojn, kies bildon ni eĉ ne povas imagi nuntempe. La juro de la estontaj regnoj fariĝos amo, kiu komprenas nur indulgon kaj pardonon. Sub ĝia influo tre moligiĝos la homaj karakteroj. Pasos la tempoj de barbareco; kun teruro oni rememoros la sangajn paĝojn de nia historio kaj ridos pri multaj nunaj celadoj. Tamen oni ne ridos pri nia sankta movado. Oni benos ĝin kaj kronos per laŭra krono por eterna rememoro. Ni ja konstruas por ili, tiuj estontaj homoj kaj iliaj koroj tion profunde sentos...

La palpebroj de unu kursano tremetas. Apoginte sin per kubuto ŝi fikse rigardas la vizaĝon de la instruisto kaj pensas. La maldikaj fingroj gracie korektas la frizaĵon, io haltigas ŝian spiradon en la gorĝo, kaj la blonda kapo de l' instruisto, ŝajnas al ŝi, entenas la plej noblajn ideojn.

Dume la instruisto flame alvokas al laborado por la estonteco, por ke kiel eble plej baldaŭ aperu la fruktoj de senĉesaj propagando kaj laboro.

Jes, jes, ŝi laboros. Ŝi pluportos la semon de la sankta homarana amo. Ŝi pardonos la malkojn. Ŝi ofte rifuzos plezurojn por la sankta ideo. Sed... kaj ŝia brusto subite alte leviĝas, kaj kun profunda ekspiro aperas akra penso de envido:

— Ho, kiel volonte mi dezirus esti kun tiuj, la estontaj!... Vidi la fruktojn de nia nuna laboro!

* * *

La Kriminalmuzeo en Dresden.

(Irado tra la infero.)

La Dresdena Kriminalmuzeo estas unu el la plej ampleksaj kaj plej bone instalitaj de la tuta mondo. Tiu muzeo estas kreita en la jaro 1894 el la iama polica muzeo. Ĝi enhavas tri ĉefpartojn: historian, instruon kaj specialkriminalan partojn. Intencante laŭgrade instigi la misteron, oni devas trapaŝi ĉiujn tri partojn laŭvice.

En la historia parto oni vidas unue bildojn, kiuj havas policfakan signifon, plue estas bilde videblaj ekipado kaj organizado de eksterlandaj policanoj. Multaj fotografajoj montras, ĉe kiuj gravaj okazoj policanoj deĵoris, ekz. okaze de festenoj, inaŭgurado de monumentoj, festo de la unua de majo ktp. Tiam sekvas fotoj pri akcidentoj, sed ĉiam evidentigas la plej dramaj momentoj ĉe tiaj malfeliĉaj okazoj, ekz. renversita aŭtomobilo je stratando, karambolita fervojvagono, enabismigita aeroplano kaj apudkuŝanta morta aerveturisto kaj lia akompananto. Plue oni vidas bilde la funkciadon de la polichundoj, ekz. estas montrite, kiel nia en Dresden bone konata polichundo „Princo“ albirdigas pupon, reprezentanta dronitan homon, plue kiel „Princo“ suprenrampas muron. Kaj apud la plej nuntempaj kuŝas puniloj de la esinteco, kiujn oni regule vidas nur malofte. Jen pendas la kolkrispo, kiu al la krimulo pene mallarĝigis la spiradon, kaj jen oni vidas „bastonon“, en kiu estas premeigita arestito, kaj la ŝraŭboj, per kiuj oni kontuzis lin, kaj fine jen la tabullito, sur kiu li estis porfote entendata. Sur fortika bloko kuŝas, silentparoleme

Tra la lakte-diafana tegmento de la „edukejo“ torente fluas la radioj de printempa hela siberia suno. Tra la vitraj muroj de la larĝa aŭditorio de ĉiuj flankoj estas vidataj belaj pejzaĝoj de Altajaj montoj. Kiel perloj kuŝas la lavangoj de neĝo sur la malproksimaj pintoj de l' gigantaj rokoj. Malsupre la valoj jen disvastiĝas je grandaj ebenaĵoj, jen kunfingras ĝis abismaj mallumaj fendegoj. Tie supre, la eterne verdaj pintoj jam ne povas konkuri kun la freŝa verdaĵo de la malsupraj valoj, kie plenakva monta rivero brilas kaj ludas sub la suno, kvazaŭ hidrarga serpento.

Super la edukejo etendiĝas la reloj de aera fervojo. Ili perdiĝas en la aero, malproksimen, kondukante al la neĝaj montaj pintoj. Periode venas kaj forflugas vagonoj. Oni povas vidi la pasaĝerojn diversnacajn, diverskolorajn jen elirantajn el la vagonoj sur altan peronon, jen envagongiĝantajn, forflugantaj. La vagonoj estas kombinaĵo de la estinta aeroplano kun helikoptero. Kiel estintaj fervojaj vagonaroj ili kuras kun grandega rapideco akroĉitaj al reloj etenditaj en aero. Oni bezonas nur dekkvin horojn por atingi Saharon. En la daŭro de du tagoj oni ĉirkaŭveturas la tutan terglobon. Multaj ankoraŭ preferas veturi en aerobusoj libere en la aero, sed ĉiuj tempoparemluloj preferas la aervojvojn, pro ilia ĝustatempa kaj direkta funkciado.

Venki la tempon! Tiu devizo estis starigita kiel plej grava stimulo de la XXI-a jarcento. La spacon oni venkos nur, se estos venkita ĝia kvara dimensio — la tempo.

En la aŭditorio la lektoro ĵus komencis prelegon tuŝante la modernan „tempovenkan“ temon. Li instruas „stenologion“, sciencan, kiu traktas speciale la ŝparadon de tempo. Vere, kiom nun povas fari homo en mallonga tempo, por kio aniaŭe oni bezonis tagojn kaj jarojn. La ĉefa venko estis eltrovo de kemie preparita albumino kaj de aliaj nutraj substancoj. La liberigita cerbo de l' homo komencis produkti senĉese klaran, precizan pensadon. Ĝiaj kapabloj mirinde multobliĝis. La sano de l' homoj stabiliziĝis post la fina venko de Doktoro Ambonasitra, madagaskarano, kiu eltrovis la rimedon por kontraŭstari la detruantajn bacilojn.

Mirindajn rezultatojn donis la kuracado per naturaj metodoj kaj per metodo de mentala influo. La malnovmodan sporton anstataŭtis novaj ekzercoj de l' muskoloj per elektro.

La leciono de stenologio temas hodiaŭ ankaŭ pri la arto de moderna parolo. Por la kolosa amaso da scioj, bezonata por moderna homo, estas tro longa, mallaŭga la simpla lingvo, uzata en la ordinara vivo. Homo scienca ŝparas tempon kaj kombinas per unu, du sonoj iun longfrazan ideon, specifikan komprenon aŭ grandan formulon. La scienco de l' oratora parolo fariĝis same komplika kiel muziko. Ne sufiĉas nur scii la ideoparolojn, oni devas ankaŭ kombini ilin per bela, rima formo. Ĉiuj memoras la rekordan paroladon de l' ĉino Tung, kiu prelegis la tutan historion de internaciaj rilatoj de l' homaro dum tri horoj! Kaj tuŝante la temon de homa parolo en la esinteco, la lektoro mokas la „gramatikojn“ de antikvaj lingvoj, la anekdotan skriban lingvon de angloj, francoj, rusoj, la turmentan skribon de japanoj kaj ĉinoj. Lia voĉo tamen leviĝas, kiam li tuŝas la mirindan elpensadon de D-ro Zamenhof:

kiel la emociaj okazintaĵoj de l' vivo, — ekzekuta hakilo.

La partode de la instruiloj evidentigas la ampleksan studadon de l' kriminalisto. Ĉiusepacaj objektoj, peltajoj, altaprezaj ŝtonoj, modeloj de korpaj partoj, nodoj, tranĉiloj ktp. devas perigi al la kriminalista studento la kapablecon precize scii kaj nomi tion, kion li ĉiuokaze havas antaŭ si. Al tio apartenas ankaŭ la kolekto por postsignoj de sango. Tiun kolekton riĉe ampleksiĝis (okaze de feliĉaj cirkonstancoj) la iama policprezidanto D-ro Grille (favoranto de Esperanto). Ne sen amuziĝi oni rigardas la kaŝejojn de ŝtelistoj. Okaze de traserĉado en lignaĵistejo certe kelkio estus ema senatente rigardi rabotilon. Sed la kriminalisto scios, kian kaŝeblecon havas la interno de rabotilo. En daŭre plenigita plumingo povas troviĝi ujo de altaprezaj ŝtonoj, kaj plenigita cigarujo samtempe estas esti monkaseto (pro duobla fundo). Kaj franda kolbaso povas enhavi bankbiletojn.

Vidinte la mezuradon laŭ Bertillon, la daktiloskopian metodon kaj la metodon de l' revigado de la vizaĝo ĉe mortintoj (laŭ profesoro Minovicis), oni fine venas en la kriminalan parton. Tiu granda loko estas dividita en kelkajn kabinetojn. Rimarkindan kolekton montras kabineto, en kiu oni vidas pruvojn pri naŭzaj devojiĝoj rilate al moraleco. Al tio aliĝas la plej interesa parto de tiu ĉambro: bildoj kaj objektoj rilatantaj al krimoj kontraŭ la vivo. Nun oni fakte troviĝas en la vera infero de tiu granda infero. Tie oni vidas bilde kaj modele lokojn, kie okazis krimoj, ekz. ĉambroon fotografian de antaŭ la pordo, kampareton, arbardeklivon. Sed tio certe

— ... Kiu elpensis la lingvon? Simpla kuracisto, modesta, filo de disĵetita tra la mondo, senhejma nacio. En la malnovan ideon de internacia lingvo, sekan kaj sciencon, li plantis la spiriton de vivo — la spiriton de homa amo, kvazaŭ klarvide antaŭsentante la venontan epokon. Granda, scienca estis la elpensado de Zamenhof, sed ni kutimas pliŝati en ĝi la spiritan flankon. Ĝi estis fajrero, kiu ekardigis la animojn de liaj disĉiploj, laborantaj en la tempo de teruraj mondaj militoj. Ili predikis la amon kaj kunfratiĝon en la tempo, kiam la tuta mondo baraktis en maro de homa sango. Ĉu pro tio ne estas ilia ago tiom signifa por ni, tiu senekzempla, sankta batalo? En niaj pacaj tempoj ni ne forgesu ilin, la nekonaĵajn mizerulojn, kiuj pensis pri ni, kiuj por ni laboris...

La bukloj de unu juna fraŭlino tremas. Gracie ŝi sin envolvas en delikatan lanan mantelon kaj pensas. Jam flugas for de la leciono ŝiaj junaj pensoj.

— Ho, tiu maro de sango kaj prediko de amo samtempe! Kiel belanimaj estis tiuj homoj! En nia tempo jam ne ekzistas simila batalo. Ĉio pasas science mezurita, rapidakta kaj enuiga. Vere, la vivo ekzistis nur en la malnovaj, romantikaj tempoj!

Ŝia spiro pliofiĝas, la okuloj penseme fiksigas sur iun malproksiman montopinton. Subite nun decidemo ŝi levas la kapon, kaj ŝia pugno malpeze falas sur la genuon: — Ho, se mi estus tiam, kun ili, kun tiuj estintaj mizeruloj! Por batali, por ami! Por labori por la estontaj...

Oron!

De l' islanda poeto Johann G. Sigurdson. Tradukis el islanda lingvo Björn P. Blöndal.

Kiam li fariĝis plenaĝa, li devis foriri el la gepatra hejmo, ĉar liaj gepatroj havis multajn infanojn, sed malmulte da oro.

Lia patro donis al li la vojaĝbastonon kaj tenis lin dirante: „Estu feliĉa, mia knabo, kaj trovu multon da oro!“

Lia patrino kisis lin, karese manfrapetis lian vangon kaj diris: „Bona Dio ĉiam vin gardu kaj donu al vi oron!“

Goja kaj sana li ekmarŝis, li havis multajn esperojn, sed nenian oron.

Post mallonga marŝado li komencis pripensi, kiun vojon elektii, ĉar li vidis diversajn vojojn.

Li ekvidis maljunan viron, grandan, blankharan, kurbigitan kaj bonaspektan. Tiu legis mallaŭte en grandega libro.

La knabo demetis sian ĉapon kaj diris: „Sinjoro, ĉu vi volas instrui al mi tion, kio estas en via libro?“

La maljunulo etendis la manon kaj diris: „Oron, oron!“

La knabo skuis la kapon, ĉar li ne posedis oron. „Ĉu vi eble volas diri al mi, kiun vojon mi devas iri?“ li demandis ŝanceliĝe.

La maljunulo levis la kapon, denove etendis la manon kaj diris: „Oron, oron!“

Sed la knabo elektis la plej rektan kaj plej ebenan vojon.

Post ioma marŝado li vidis virgulinon, belegan virgulinon; ŝi ŝajnis esti la korpiginta senpekeco kaj boneco.

neniun interesiĝis, se li ne vidas kuŝantan homan korpon, la oferon de iu krimulo; tio ne estus interesa sen vidi la postsignojn de terura batalo kaj la sangomarceton, fluetantan el la korpo de mortigito. Poste oni vidas ekzemplojn pri falsa ludado, kontrabando kaj falsajoj. Fine estas montrataj ilustraĵoj pri ŝteloj, ĉe kiuj ankaŭ la mortigo ludas gravan rolon. Disrompita kaseto, disĉizitaj monŝrankoj staras unu apud la alia. Plue estas videblaj bataliloj kontraŭ la krimularo laŭ la plej nova tekniko. Kun trankviligo oni rigardas kaŝarifike konstruitajn serurojn, kiuj ebligas izoli ĉambrojn. Kiel amato oni vidas kun agraba sento la insidajn metaŝadenetojn, kiuj evidente malmultŝajne treniĝas ĉe piedo de muzea statuo. Sed sufiĉas nur iom luevi tiun statuon kaj tuj eksonas infera sonorado aŭ bruego, kiu daŭras, ankaŭ se la krimulo estus reportinta sian rabadon. La sama metodo estas definitiva por la ŝirmado pri multvaloraĵaj pentraĵoj. Evidentiĝas, ke juvelisto havas multajn eblecojn por sekurigi siajn valoregajn aĵojn. Je la fino oni estas ricevinta la impreson, ke la filoj de l' malmuceo, laborantaj disigite kaj senmetode, ne povas atingi la venkantan forton, per kiu estas doŝtitaj la disĉiploj de l' „Sankta Hermandado“.

Do, ĉu samfakano polica, vizitante Dresden, nepre devas vidi tiun muzeon, kiu estas tre instrua por ĉiu.

El „Die Sächsische Polizei.“ Esperantigis Johannes Mucke.

Dusenca respondo.

Brutkomercisto sendis jenan telegramon: „Jam ses bovoj forsenditaj, morgaŭ ankaŭ mi iros.“

Alia: „Se vi bezonas bruton, turnu vin al mi.“

„Ĉu vi volas iri kun mi kaj fariĝi mia fianĉino?“ Ŝi ekridetis, etendis la manon kaj sible diris: „Oron, oron!“

Sed li posedis nenian oron, kaj ŝi retiris sian manon kaj ĉesis rideti.

Poste alvenis alia viro; li donis al ŝi oran moneron, zonomis sin per ora zono, kaj metis oran diademon sur sian kapon.

Ŝi ridetis denove kaj volvis siajn manojn ĉirkaŭ la kolo de la dominto.

La vojo malebeniĝis, kaj la aero estis varmega. Li sentis fortan soifon kaj — alproksimiĝinte farmodomon — petis, ke oni donu al li trinkaĵon.

Sed la gemastroj etendis la manojn dirante: „Oron, oron!“

Jen li kliniĝis, kaj trinkis la surteran kotoplenan akvon.

Fine li atingis la landon de la serpentoj. Tien li erare iris. Sed la feliĉo estas sur la alia mondflino.

Tuj la serpentoj mordis lin. Tamen li sukcesis reiri al la homoj, mortonta pro la serpenta mordo.

Terure li suferis; lia lango estis seka kiel peco da lano, kaj li petis la homojn pri helpo.

Sed la homoj serioze ĉirkaŭstaris la mortantan viron, etendis la manojn dirante: „Oron, oron!“

Li mortis; la morto ne postulis oron.

Ili devis entombigi lin, por ke lia korpo, putriĝante, ne venenu la aeron.

Sed dum ili surŝovelis la teron, ili murmuris: „Oron, oron!“

Fine ili faris la signon de la kruco super la tombo, interfingris siajn manojn kaj preĝis jene: „Dio mia, Sinjoro mia, oron, oron!“

Du leteroj.

Originalo de Endre Hevesi, Budapest.

I. El la vivo al la morto.

Vivlando, dato nenecesa, ĉar ĉiu tago egulas la alian.

Atlestimata sinjoro Morto, mia kara amiko!

Vere surprizis min via ŝatata letero kaj elkore mi dankas vin, ke vi interesigas pri mia bonfarto, pri mia vivo. Mi respondas unue vian demandon: mi tre bone fartas, tre bone vivos. Kvankam mi scias, ke la vorto „vivo“ kaj la vortoj „tre bone“ ne iuĝas unu por la alia — laŭ via ideologio. Sed tion mi ja komprenas; vi vobas el la vivo nur la finon: ĝi estas vere malbela. Kiam la vivoplena, flama korpo senvarmiĝas, kiam la fluinta ruĝa sango glaciĝas — br! —, eĉ kiel penso tio estas terura.

Vi estas, kara mia amiko Morto, embarasita pri la vivo. Vi ne prijuĝu — vi eĉ ne devas prijuĝi — laŭ la fino — kiun vi konas — la tutan vivon! Ĉar tia juĝo ne estas justa. Kion vi dirus, se pri la kiso mi malice farus konkludojn nur fial, ĉar dum la kizado — sed nur je ĝia fino — mia kunkisantino mordis min per siaj malgrandaj, sed tiom pli akraj dentoj? Maljusta mi estas, se mi konkludus el tia malagrabla, fina koincido iun malbonan pri tiu plezuro, kiun mi antaŭe kune kun ŝi havis. — La morto estas por la vivo koincido fina, sed mi petas ankaŭ vin, ke ne ekskluzive laŭ tiu ĉi koincido vi rigardu tiun plezuron, kies nomo estas vivo.

Diversaĵoj.

Transplantado de kapoj.

En la Reĝa Medicina Societo en London la Kuracisto Graham Cannon faris paroladon pri eksperimentoj, kiujn li efektivegis konc. transplantadon de membroj de iu besto sur alian.

La supro de liaj klarigoj estis la transplantado de kapoj. Tiajn eksperimentojn li efektivegis sukcese ĉe skaraboj. Senkapiginte bestojn li transplantis iliajn kapojn alterne sur aliajn skarabojn. En pluraj okazoj la eksperimentoj liveris — laŭ lia aserto — epokfarantajn rezultatojn. Post la transigo de l' fremda kapo la bestetoj vivis pli malpli 6 semajnoj kaj evoluis tute normale, t. e. la korpoj alprenis la specon kaj la seksosignojn de la bestetoj, kies kapojn oni transplantis sur ilin. *Kluza.*

Ĉirkaŭ la mondo per motorbiciklo.

Antaŭ kelkaj tagoj trapasis Estonion la mondvojaĝanto, nederlandano A. F. de Groot, forveturinta el Amsterdam la 10. okt. 1922. Traveturinte Germanion (Aachen, Düsseldorf, Hamburg), Danlandon kaj Skandinavion, la kuraĝa vojaĝanto malgraŭ profunda neĝo sukcese atingis Helsingfors-on. Tie, pro nericevo de rusa vizo, li estis divigata ŝanĝi la fiksitan vojan planon kaj sin direkti suden. Post 2-taga restado en Reval (Tallinn), s-o de Groot foriris Latvion, daŭrigante la vojaĝon tra Litovio, Pollando kaj Rumanio al Turklando. S-o Groot, krom la gepatra lingvo, parolas germane kaj angle kaj ebligas sian entreprenon, kunlaborante en diversaj gazetoj kaj revuoj. La pakajo konsistas el ĉ. 40 kg., inter ili interesa

Ke mi kuraĝis vin instrui tiel senestime, pardonu al mi; mi volis nur montri al vi, kial via, de mi tre ŝatata persono estas malbone akceptata inter la vivantoj.

Vi, kara Morto, ne povas forigi vian individuon; vi estas kaj restas ĉiam, ĉie kaj ĉiel sinjoro Morto. Vi ne povas vin adapti al la vivantoj. Se vi ekaperas en la ĝaja societo, anstataŭ vin konformigi al la ĝajeco de la kunestantoj, vi intencas ilin transformi laŭ via plaĉo. Tio — nature — interrompas la bonhumoron; fial en via ĉesto la vivuloj sin sentas malagrabla, — eĉ, mi povas diri, malbone. Kaj la kaŭzo de tia malbonhumorigo estas ĉiam vi, kara amiko, ne koleru, ke mi diras tion malkaŝe.

Sed pli malagrabla ol via ĝojon detruante kutimo estas por la homoj, ke vi havas principojn. Tion ĉi ne toleras la loĝantaro de la vivlando. Vi agas ĉiam laŭ plano, vi ĉion pripensas antaŭ ol agi. Kaj vi agas! Tie ĉi sin kaŝas la kontrasto. La homoj — kontraŭe — neniam pripensas antaŭe siajn agojn. — Via demokrata pensmaniero — ho, mil pardonojn pro la nekonevena vorto, mi ne volis vin ofendi —, viaj demokratraj vidpunktoj ankaŭ malamalgigas la homojn kontraŭ vi. Vi parolas kun ĉiuj samforme, vi ne respektas la privilegion de l' naskiĝo kaj mono. Pro tio vin malamegas, — jes, malamegas! — miaj homfratoj plej multe. Tion ĉi kaj la ĵus nomitajn kutimojn vi devas ĉesigi, se vi deziras ekzistrajton inter la homoj.

Sed — por paroli sincere — eĉ mi mem ne komprenas vin, kara amiko. Vi estas seriozulo — tion ĉi vi asertas konstante — kaj tamen vi faras infanajn petalojn. Mi bone vidis vin, petolema bubo, kiam, je vespera krepusko vi ŝovis sur la stratoj — ĉu ŝerco? — vian falĉilon inter la piedojn de pasantoj, por ke ili faletu. Devigite eĉ mi mem ridis vidante, kiel baraktis la viktimoj, ne povante restariĝi, sed — se mi pripensas — via faro estis malbonevena petalojo, ne inda je iu, kiu nomas sin serioza. Eĉ kun maljunuloj vi petolas tiel terure!

Mi ĉesas riproĉi vin, ĉar vi ekkoleras. Dio vidas mian animon: mi ne volas, ke vi koleru min, ĉar vi estas, kara Morĉjo, mia sola amiko en la vivo.

Kiam mi revidos vin? Tre mi ŝatus denove interparoli kun vi; ĝustadire ne interparoli, nur aŭdi vin (ĉar kiam vi parolas, mi sidas senforte), aŭdi viajn rakontojn pri viaj vojaĝoj kaj la homoj. Ĉar la homojn vi konas plej profunde kaj plej detale — tio estas nedubebla.

Cent vortojn mi resumas per unu: mi atendas vin, kara Morto; do malfru ne estus dece.

Ĝis la revido deziras al vi ĉion bonan via eterne danka amiko

D-ro Homo.

II. El la morto al la Vivo.

Mortlando, kie ne ekzistas tempo, do mi ne povas datumi mian leteron.

Kara Viveto!

Unue mi informas vin, ke mi feliĉe alvenis. La vojaĝo estis bela, la kunvojaĝantoj estis ĝajaj, nur vi malagrabligis iom la forvojaĝon per la longa adiaŭdo, kiun vi aranĝis je mia honoro. Ĉu vi pensas, ke vi faciligis mian vojaĝon per viaj senfinaj ploradoj? Nur nun — malproksime de vi — mi vidas kaj pripensas, kiel ridinda estis

albumo de fotoj kaj eltranĉaĵoj. La venontan jaron la vojaĝanto estas veturonta tra Ameriko. *R. L., Tallinn.*

Per velboato trans oceanon.

La 26-an de majo posttagmeze en Bregenz (Aŭstrio) okazis elveturo de 12 m. longa oceanvelboato „Sowitagoht 5“ (regiona dialekto signifanta: „Soweit es geht“ = „Tiel malproksimen ni venos“). La adiaŭdo okazis en ĉesto de provincentroj kaj multombraj unuigoj. Akompanite de multaj rem- kaj velboatoj sub muziksonoj kaj ĝojkanonkrakado forlasis „Sowitagoht 5“ je la tria la hejman havenon (Bregenz estas lokata ĉe lago Bodensee), por veli al Romanshorn, de kie ĝi estas veturigata perfervoje al Hamburg, akompanite de s-o Einsle. S-oj Plunder kaj Jochum post kelkaj tagoj veturos al Hamburg, kie komenciĝos la oceanvojaĝo; ĝi gvidos al kanariaj insuloj kaj de tie al New York. La velantoj provizitaj per nutraĵoj por tri monatoj esperas, atingi sian celon post ĉ. ses semajnoj. *H. J. W.*

Konfeso

(Serca akrostiko en albumo).

Mia devo estas diri
Indan veron, tamen tim'
Apud vi eĉ laŭte spiri
Metas min al ruza rim':
Antaŭ vi mi buŝon baras,
Sen parolo, sen esper'
Vin evitas mi, eraras....
Inter grandliteroj staras
Nur por vi silenta ver'.

M. Soloviev.

tiu longa forradiaŭdo kaj tiuj longaj porvojaĝaj predikadoj en la ceremonihalo de la stacidomo. — Sed mi jetas densan vualon sur la estintajn.

De ĉi tie, kara Viveto, oni rigardas vin ĉiujn tute aliaj, kaj eĉ mi jam pensas alie ol mi pensis estante inter vi, sur la tero. Mi imagas mian aliformiĝon kiel tiun de eŭropano, kiu transiras Amerikon kaj post mallonga tempo rigardas la maljunan Eŭropon per amerikanaj okuloj.

Vi estas certe scivola pri mia vivado. Kiel mi vivas? Neniel, mia kara amikino; tio estas: tre bone. Pri la vivo mi havas jam tute alian ideon. Se mi tion rakontus dum la merkred-vespera te-kaj danckunveno, oni certe forpelus min el la societo. Sed ĉi tie mi ne bezonas timi tion; do mi donas al vi fragmentojn de mia nova vivrigardo.

Unue mi malŝategas tion, kion vi sur la tero ŝafis plej multe: la Monon. Simple por praktikaj kaŭzoj. Ĉu, kara Viveto, vi ŝatas vojaĝi kun multaj kaj necesaj pakajoj? Certe ne. Mi ankaŭ same malŝatas la superfluan pakajon, kaj dum mia lasta kaj fina vojaĝo mi konstatis — kion mi dum mia estinta vivado nur supozis —, ke la plej maltaŭga pakajo estas la mono. Mi do konsilas al vi, kara amikino, antaŭ ol vi vojaĝos ĉi tien, formetu malproksimen vian monpakajon, por ke ĝi ne povu malhelpi vin dum la lasta kaj plej majesta vojaĝo.

Ho, karulino, nur nun mi vidas klare, kion da sencelaj neniaĵoj kaj evitindaj vanaĵoj vi faras sur la tero: vi konkuras, envasias, celas altan rangon, politikumas. Eksciu, ke ĉio estas vana!

Kial vi konkuras? Eble pro tio, ke ni mortlandanoj povu vin mokridi? Kial vi envasias? Vi envasias, ĉar iu alia havas aŭtomobilon aŭ veturilon kvarĉevalan, aŭ ĉar li vojaĝas unuaklase per rapida vagonaro.

Konkuro, envio: frenezajoj!

Se vi vere kaj fine entreprenos tiun vojaĝon, kiun ĉiu homo faros, (feliĉa kiu ne bezonas ĝin longe atendi), vi ĉiuj en la sama klaso vojaĝos kun la sama — por vi neimagebla — komforto.

Aŭtomobilo, veturilo, loĝio en la Operejo, diaĉemoj milfajreraj, kare pagataj amatinoj, perdoj de milionoj por kartludo ĉio — aferoj de konkuro kaj envio! Ho kiaj grandaj infanoj vi estas! Ridindaj grandaj infanoj!

Rango ekzistas ankaŭ nur unu sola ĉe ni, kiun ĉiuj akiras senpage: estinta vivulo (mallongigite: e. v.). Tiun ĉi rangon ĉiu ricevas, eĉ se li estis ministro inter vi.

Cetere ministro! Ni ne politikumas. Tio estas nia principo. Sed de tiu ĉi principo ni neniam flankiĝas ĉu dekstren aŭ maldekstren. Kaj vi...?! Vi politikumas per kaj por principoj; sed la principojn vi ŝanĝas kiel junaj liceanoj intersanĝas postmarkojn.

Politiko estas amuzado. Ni bedaŭras tiujn elkore, kiuj havas nur tian amuzadon.

Jen kiel ni vivas: senkonkure, senenvie kaj sen politiko, kiel fratoj; amo ĉirkaŭas nin ĉiujn.

Per tiuj ĉi fragmentoj mi desegnis la restadon (vi dirus: vivon) en la „Ameriko de l' Vivo“ — kiel oni nomas ĉi tie nian regnon.

— Se en Eŭropo ne plaĉas al iu, li transiras Amerikon; se la Vivo ne plaĉas, oni transvenas ĉi tien — tiel klarigis al mi Mortlandano la originalan nomon de mia nova hejmo. Ĝi estas trafa.

Per tio mi finas mian leteron, kara Viveto. Vespere mi vizitos teatron, kie oni ludos hodiaŭ je la naŭcentmil-sepdekob-biliona fojo — tute laŭ amerikaj dimensioj la sensacian „Mortodancon“, kiu ĉiuvespere havas grandan sukceson antaŭ plena aŭditorio. Ĉe vi, sur la tero, oni certe fajfus kaj aranĝus skandalon dum la prezentado. Eble la cenzuro eĉ malpermesus la prezentadon.

Mi salutas ĉiujn: Kokineton, Kokineton, Vestigemineton, Dancemineton, la „Bonaj amikoj“ — mang- kaj trinksocieton, la tramveturilojn, la legolibroeldonantojn kaj la aliajn — pro manko de loko — ne nome menciitajn. Al vi, karulino, mi deziras feliĉan vojaĝon al ni, kaj ĝis la revido mi kisas per miaj sangruĝaj mortintaj lipoj vian sensangan — vivplenan buŝon. *Via*

D-ro Homo, e. v.

Vi memoras.

de Sievan Zivanoviĉ.

Vi memoras: la boato
Nia naĝis tra l' ondaro:
Saŭmo blanka flustris tiam
Aman kanton al la maro.
Vi memoras: ĉe tombejo
Estis tiam rigard' via...
Vi memoras: el okulo
Fluis larvo perla, pia...
Tiam vian perlan larmon, —
Vi memoras, mi kompentis:
Estis iu, kiu mortis,
Kiu por kor' havis ĉarmon,
Kies morto frue venis
Kaj en tombon lin forportis.

ĈU PENSAS NUR PRI LA MALICO DE LA ALIAJ, KAJ NENIU SERIOZE PENAS PLIBONIĜI. TIAL LA MALBONO ĈIE DAŪRIĜAS.

Konferenco de Lausanne.

Lasta krizo. — Solena ferma ceremonio. — Ekonomia agado. — Albanio. — Nokta festo sur la lago.

Lausanne, 16. junio.

Travivi krizojn, estas la kutima sorto de politikaj konferencoj. Jam ofte la gazetaro raportis pri krizoj de la Konferenco de Lausanne. Sed nun la konferenco eniris en sian lastan krizon —, ĉar tiu nova disarmonio, kiu ekzistas deponi unu semajno, filatas al la plej lasta el la grandaj problemoj: la pagado de la interzonoj por la pruntoj, prenitaj de Turkio en eksterlando, antaŭ la mondmilito. Mi ne bezonas paroli pri tiu afero, ĉar ĝi certe jam trovis solvon aŭ eksplodigis la konferencon, kiam tiuj linioj aperas.

La ĝenerala sekretario de la konferenco ne estas tute pesimista pri la fina rezulto. Almenaŭ li jam demandis la svisan registaron en Bern, ĉu ĝi akceptus delegi unu el siaj membroj al Lausanne por prezidi la (eventualan) solenan ceremonion de la subskribo de la Paca Traktato. Laŭ miaj informoj tiu delegito estos la prezidanto mem de la Sviza Respubliko, s-o Scheurer, kiu faros gravan paroladon. Oni rememoras al Lausanne por prezidi la (eventualan) solenan ceremonion de la subskribo de la Paca Traktato. Laŭ miaj informoj tiu delegito estos la prezidanto mem de la Sviza Respubliko, s-o Scheurer, kiu faros gravan paroladon. Oni rememoras al Lausanne por prezidi la (eventualan) solenan ceremonion de la subskribo de la Paca Traktato. Laŭ miaj informoj tiu delegito estos la prezidanto mem de la Sviza Respubliko, s-o Scheurer, kiu faros gravan paroladon. Oni rememoras al Lausanne por prezidi la (eventualan) solenan ceremonion de la subskribo de la Paca Traktato.

Ke la subskribo de Paca Traktato estas tre necesa por Turkio, tion montras la ekonomia agado en Lausanne. Malgraŭ ĉiu diskreteco, reganta en financaj rondoj, la agentejo „Esperanto-Press“ povis sciigi, ke ekzistas diversaj grupoj, kiuj faris al la turka registaro ekonomiajn proponojn. Sviza grupo, al kiu apartenas la kolonelo Fonjallaz en Lausanne kaj la konata industriisto Jules Bloch en La Chaux-de-Fonds, deziras ricevi la turkan alumentan monopolon kaj koncesiojn por la ekspluato de minoj; ĝi volas ankaŭ konstrui hotelojn en Angora kaj en la per buĝeto detruita Smyrna. Angloj kaj francoj deziras finance partopreni en la „Eksporta kaj Importa Kompanio“ de Angora, kiu havas la specialan favoron de la turka registaro. Fine oni ankaŭ parolas pri fondo de turka-franca asekura kompanio kun kapitalo de 70 milionoj da frankoj. Kiel bazo por tiuj planoj servas la Paca Traktato, kiu farigis tiel la elirpunkto de la rekonstruado de la turka ekonomia vivo.

Ankaŭ Albanio, kies ministro Frasherri partoprenis la konferencon, uzis tiun internacian kunvenon por ekinterrilati kun industriistoj. Precipe sviza grupo forte interesiĝas por ekonomia agado en Albanio. Sur la tagordo de tiuj diskutoj staris la konstruo de moderna hotelo en la ĉefurbo Tirana, la ekspluatado de la naturaj akvofontoj por konstruo de elektretoj, kaj la senakvigo de la vastaj marĉaj regionoj, kiuj iam donos teron plej frukteman. Kvankam Albanio estas preskaŭ nekonata, la grava tasko de la albanaj delegitoj estas multe faciligata: ili havas en la poŝto tre valoran dokumenton de la Ligo de Nacioj, kies eksperto konstatas, ke Albanio estas vera ekonomia trezoro...

Kvankam la loĝantaro de Lausanne ne profunde konas la orientan problemon, ĝi ne estas tute indiferenta je la fina rezulto de la „Konferenco por la Paco en Oriento“. Lausanne kore deziras al tiu konferenco plenan sukceson, ĉar tiam oni solene festos: brilan „nokta festo“ kun bela iluminado de la Lago de Genève — jen la danko kaj la plezuro de Lausanne!

Hj. Unger.

Esperanto-Press.

La artikolo de „Esperanto-Press“ estas senpage al la dispo de ĉiu, kiu volas traduki ilin en nacian lingvon kaj apriigi en gazetoj de sia urbo aŭ lando. Du kondiĉoj: ĉiam ĉi la agentejo „Esperanto-Press“ kaj sendi unu ekz. de ĉiu represita artikolo al la direktanto de „Esperanto-Press“, s-o Hj. Unger, Lausanne (Sviza), Case St. Francois 7508.

Sveda Foiro.

La agentejo „Esperanto-Press“ sciigas, ke la proksima sveda foiro en Malmoe okazos de 30. julio ĝis 5. aŭgusto. La Malmoe-a Foiro estas la plej grava entrepreno tiuspeca en Svedio, jam pro sia facila komunikado kun la eŭropa kontinento. La specialeco de tiu foiro estas la metala kaj ligna industrio, plue la teksta kaj kemie-teknika branĉo.

En la kvara foiro, 1922, partoprenis 322 ekspozantoj. Inter la 9104 aĉetantoj estis 342 eksterlandanoj. La foiro oficejo troviĝas en Malmoe, Kalendegatan 4.

Genève—München en 3 horoj.

La agentejo „Esperanto-Press“ sciigas, ke la poŝta aeroplano de la kompanio „Ad Astra“ en Zürich, kiu regule servas la linion Genève—München—Genève, lastatempe flugis de Genève al Zürich en 1 h. 25 min., kaj de Zürich al München en 1 h. 30 min., entute do 2 h. 55 min. Kompare, la rapidtreno de Genève al München bezonas 15 horojn!

La kunlaborantoj de „Esperanto-Press“ estas urĝe petataj, sendi po 1 ekzemplero de ĉiu artikolo, publikigita en nacia gazeto, al: „Esperanto-Press“, en Lausanne (Sviza), Case-Ville 7508. — La sendo de tiu ekzemplero estas tre necesa por statistika kaj propaganda celoj!

Koopero.

La Direktanta Komitato de la Int. Ligo kunveninte en Haag la 22. 4. fiksas je la unua sabato de julio ĉiujara la feston de la „Internacia Tago de la Kooperado“. La unua solena festo okazos la 7. julio nunjara. Ĉiuj kooperistoj volos inde soleni ĝin, en ĉiuj landoj.

E. B.

Filatelio.

Ruslando.

Novaj poŝtmarkoj: 3 rubl. (soldato) rozkolora, 4 r. (laboristo) bruna, 5 r. (vilaĝano) helblua, 10 r. (soldato) ardeza. Blanka papero, dentumita, 14 1/2 x 15 mm. La ciferoj ŝajnas malgrandaj, sed ili signifas orajn rublojn: laŭ mondelondo 1925 unu tn. „ora“ rublo (fakte ĝi estas ankaŭ nur papera) estas unu miliono da sovrubloj de 1921. Simpla letero enlanda kostas nun 6500000 rublojn de 1921, rekomendita letero duoblon, rekom. aerpoŝtletero kostas 18000000.

Polujo.

Denove elvenis en la malnova aglotipo 500 (helverda), 400, 500, 1000 kaj 2000 mk. Pulpago-markoj novaj de sama tipo kaj koloro kiel la lasta eldono, sed pli grandaj (24 x 19 1/2) 200, 500 kaj 1000 mk. kun plej diversa dentumo.

S. A. T.

La mondfama scienculo A. Einstein, petite de l' redaktoro de „Sennacieca Revuo“, ke li bonvolu esti la honorprezidanto de la III-a Kongreso de „Sennacieca Asocio Tutmonda“ (S. A. T.), respondis akcepte al tiu peto. Pluajn informojn oni legu en „Sennacieca Revuo“ (Adreso de la administreto: Colmstrasse 1, III, Leipzig (Germanio)).

Bibliografio.

Nur duoble ricevitajn librojn, prospektajn k. s. ni mencias aŭ recenzas. Kiam libro aperis b. indite, ni peias minimume unu b. ind. an ekzempleron

Esp. Gazetoj.

Amerika Esperantisto, aprilo.
Novaj Tempoj, junio. — Interesa artikolo, interalie pri Pasteur, kun ties portreto.
Esperantistky Zpravodaj, majo.
La Semisto, marto-majo.
France-Esperanto, junio. Kun raporto pri la franca Esp. kongreso en Limoges.
The British Esperantist, junio. Kun raporto pri brita Esp. kongreso en Bournemouth.
Holanda Esperantisto, 9 kaj 16.6.
Literaturo Mondo, majo. La plej art. eldonata Esp. gazeto. Kun literaturaĵoj kaj artikoloj originalaj de diversnaciaj gesamdeanoj kaj tradukoj el lingvoj hispana, sveda kaj germana. Ses art. ilustr. kaj diversajn modernajn vinjetoj ornamas la paĝojn. — Pro abono skribu al la administreto en Budapest VI, Andrassy-ut. 81.

Literaturo.

Faŭst.

(6-a daŭrigo kaj fino.)

Goethe kaj Schiller, en Weimar amikiĝintaj, faris el tiu ĉi urbo la ĉefurbon de l' spirito k-ĉio sen Germanujo. Cu artisto, poeto aŭ sciencisto, ĉiuj loĝis aŭ almenaŭ renkonis sin en Weimar. De ĉi tiu kulminacia punkto disiris ĉiujparten la fluoj de l' klereco. Ambaŭ grandpoetoj, la kreintoj de l' klasikismo, laborantaj laŭ speciala literatura programo, havis multe da malamiko. Goethe longtempe toleris la malamikaĵojn ne atentante ilin; sed kiam la senhonta traktado daŭradis, li eldonis kune kun Schiller la „Musenalmannach“ (almanako de l' muzoj) En 1797 ili publikigis la „Xenien“ (ksenioj), mokversoj pri la ofte tre furiozaj atakintoj. Poste Goethe verkis fiucele la sursupenciant „Oran edziĝes on de Oberono kaj Tiziana“, en kiu li akrege mokaĝas siajn perserkutantojn. Oberono signifas la nordan spiriton, Tiziana estas la filino de l' sudo; ambaŭ prezentas kunigon de nordo kaj sudo, i. e. de l' germanismo kaj klasikismo. Dum sia tuta vivo Goethe penis realigi ĉi tiun kunigon. — Schiller mem donis al la majstro la — tre malbonan — konsilon enŝovi la mokpoezian en la Faŭst-dramo. — Entute Goethe ĉerpis el la „Ŝonĝo de Someromeza Nokto“ de Shakespeare (Puck, Arielo). — Nur tiu, kiu konas la vanecon kaj strangecon de l' poeto, komprenos, ke li enŝovis ĉi tiun krudan ŝtonon en la brilan konstruaĵon de sia majstroverko.

Ne uzante ponton, la poeto sekvigis la lastan kaj emocian scenon de la unua parto de Faŭst. Por ĝin kompreni, oni enprofundigiĝu pense en la ne verkian projekton de la infersceno. Malsuprenirante de sur la monto Brocken, Faŭst kaj Mefisto renkontas la idolon: Gren on (Margareton) ĉe l' tribunalo. La tre ekscita interparolo inter Faŭst kaj Mefisto resp. estas la grandan penton ka. la kordoloron de Goethe pri Friederike Brion. Oni faksu Mefiston nun laŭ alia vidpunkto. Goethe ĉi tie ne volis montri la kontraŭindan principon, sed la spiriton de la naturo en poezia enkorpigo de naturo-vivo. Mefisto estas la demoneca parto de l' poeto, kiu akuzas sin mem, t. e. la demonon en si, en senpova kolerego tiel, ke eĉ Mefisto tremante pro la ekko'erigoj de Faŭst eksciantas. — Ambaŭ nun ekflugas por savi Grenjon. Bruante la nigraj sorĉaj ĉevaloj ilin portantaj preterrapidas la ekzekutojn. — Skutremiga estas ĉi tiu sceno.

Ni atingas la finscenon de l' tragedio, la scenon en la Malliberejo. Ĝi estas la plej granda majstrojo, kiu nia poeziarto produktis. — Mi rimarkigas, ke Grenjo tute ne estas freneza, kvankam oni multloke legas ĉi tiun senencan aserton. Sia animistato estas senespera, triobla sangokulpo sin premeĝas, ŝia spirito estas vualita kaj ŝiaj

sentoj noktumitaj. Komence ŝi ne plu rekonas la savanton, la terura sorto ŝin terenbatis. Pruvo por tio, ke ŝi tute sencia murdis sian infanon, estas la kanto pri la malcasta patrino kaj la diro pri nura kalamio. Brilpura ŝia amo estis; reekkonante Faŭstion ekvivas tuta ŝia amo. Pri savigo aŭ liberigo ŝi nun ne plu meditas. Ŝia spirito pensanta en ĉi tiuj dangermomentoj nur pri la amo. malatentas la eblecon de savigo. Ne pro frenezeco ŝi forĝegas la dangeron, sed pro senforceco kaj pro la sekvoj de l' turmentoj animaj. Faŭstion, kiu ŝin imitas, admonadas al forkuro, ŝi ne komprenas sed liaj paroloj reestigas en ŝia memoro la konscion pri ŝia granda kulpo. Ŝi e sekvas Faŭstion kaj ne obeas liajn petegantajn vortojn; re plu logas ŝin la libereco, ĉar ŝin nun regas la firma, decida volo al peĉtofarado, al morto. Margareto levas sin al la plej alta etoso, kaj ŝi plenumas la elikan faron de l' mumpurigo en plej klara konscio kaj ne en stato de frenezeco. Ŝi volis mortigi pentofarante kaj senkulpigante sian animon; sekvan e la vokon de l' devo plej sankta ŝi levigis al la supro. En Mefisto ŝi klare ekkonas la spiriton de l' malbono, kaj ŝi timegas Faŭstion ĉe l' flanko de l' malbonulo starantan. Ŝi d'isigas la ligilon inter si kaj Faŭst, sed lasas al li sian amon, por ke ankaŭ li per la amo estu savata el la ungegoj de l' sarano. Ne la demono, sed la eterne virina firas lin supren.

Efektivan respondo pri la sorto de Faŭst Goethe ne donis en la unua parto de l' tragedio, kvankam ni per la dua parto ekscias, ke ankaŭ li estas savita. Ĉi tiu dua parto, kies traduko estas tasko treĝe malfacila, ne eblas sion pure homan, ne tiom da suferado; ĝi donas al ni la fruktojn de spertoj de l' maljuna poeto kaj montras la mondon de la grandaj, multsignifaj mondproblemoj.

M. Butin.

Parolejo.

182b. Pri la monumento.

Oni petis opiniojn pri la premiitaj projektoj por la Monumento Zamenhof.

Jam de la organiza tempo mi havis opiniojn, kio por ni artistoj estis tro delikate konigebla pro profesia motivo.

La antaŭsento, kiun mi havis jam de antaŭ unu jaro, estas pravigata per la rezultato de la konkurso. Post la lego de la opinioj de neartistoj kiel s-oj Feliks Zamenhof kaj Oscar M. Wihl, post aŭdo de la ideoj de gesamideanoj, mi diras, ke ne nur estas necese esti skulptistoj sed ankaŭ Esperantistoj por havi la kapablon la internan ideon kaj senton de Esperentismo, kaj ilin esprimi en monumento. Simpla Esperantisto vidas nenion en la projektoj pri tiuj ecoj. La partoprenintoj, ne estante Esperantistoj, opinias ke sufiĉas apliki sur banalan monumenton la stelon aŭ la terglobon kun stelo por obtieni Esperantistan monumenton. Pri „La Esperantistaro de la kvin mondpartoj, kiu priploras sian Majstron“ oni nenion vidas.

La organiza komitato organizis la konkurson loke kaj vidis malhelpon en internacie organizita konkurso. Sed ni artistoj sendas ĉiujare niajn verkojn al internaciaj artekspozicioj de la tuta mondo. Eĉ ne estas necese postuli la gipsan skizon mem, se tio alportus embarason. Oni kapablas demandi la arĥitekturajn planon kun fotografaĵoj de la skizo prenitaj de diversaj flankoj.

La plejmulto de la gesamideanoj konsideras la duan premiatan projekton pli bona ol la unuan. Mia persona opinio estas, ke tiu projekto ne nur pensigas ion al iu monumentisto, kiu staras je en Ĉeĥoslovakio, sed ke la juĝantaro, kiu estis kunmetita el meliistoj, bone vidis el la maniero, je kiu la skizo estas elaborita, ke la projekto ne kapablas melie ĝin elabori grande kaj tial elektis eĉ je la repeto de la juĝado la projekton de la unua premio kvankam malmulte kontentigan por la Esperantistaro.

Achilles Bentos,

arĥitekturo-skulptisto, Gent, Belgio.

La Org. Kom. por la Monumento al Dr. Zamenhof invitis en la „Revuo“ de lasta aprilo la tiumondan Esperantistaron sendi siajn opiniojn pri la preferata projekto.

La du koncernitajn bildojn mi montris al komisiono de tri oficialaj arĥitekturistoj de mia urbo, kaj ni kvarope unuvoĉe donis preferon al la dua premio.

Ambaŭ verkoj meritas atenton por severa aria simpla, inda de nia Majstro. Mi imagas unuan el malhela verdastria marmoro, kusanen en fosejo kun ĉirkaŭbarilo, kiel la tombo de Napoleono ĉe la Pantheon en Parizo. Sed ĝi aspektas tro laŭkutima kaj ne moderna. Ankaŭ la ornamoj super la kartoŝo iom laŭ Ludoviko XIV-a stilo, kontrastas kun la nuntempo.

Kontraŭe la dua projekto sin prezentas pli originale kaj moderne laŭ nuna gusto, kun simplaj linioj kaj belproporcia vidigo, sur tri bone kunmetitaj planoj, kiuj suprenlevas la rigardon ĝis la stuetoj kaj la supra duonfero de la mondo. Facile oni povas stari ĝin sur iun ajn lokon kaj ĝi faras forian impreson. Ĝi tigas per ĉiu materio, ĉu blanka ŝtono aŭ ruĝa marmoro aŭ granito, kun figuro el ŝtono.

La duan premion do mi elektas.

A. Esselin,

prefekteja konsilisto en Nancy.

Jurnalistoj, gazetraportistoj kaj revuistoj de l' tuta mondo!

Por ankoraŭfoje utiligi nian lingvon en gazetservo, mi proponas regulan interŝanĝon de materialo por naciaj ilustritaj gazetoj. Sendu al mi fotojn, portretojn, skemojn, diaĝrempojn ktp. (el diversaj naciaj ilustr. e'donoj) pri jenaj temoj:

1. Laboristaro: vivo, organizo, epizodoj, agado, portretoj, vivmaniero, labormetodoj.
 2. Rilatoj de eksterlando kun Sovet-Rusio, pensoj kaj opinioj.
 3. Novaĵoj el tekniko, scienco (precize, kun ilustraĵoj) kaj desegnaĵoj, nur plej novaj.
 4. Arto, sporto kaj sensaciaĵoj de tutmonda intereso.
- Ĉiu foto aŭ ilustraĵo devas havi nelongan sed precizan kaj klare komprenblan priskribon en Esperanto. Neniama malfreŝigu materialon, sendu tiuj senprokraste post la apero de gazeto! Mi kvitanco ankaŭ per ĉio dezira la laŭeble.

Adreso: Aleksandro Traherov, Novinski bulvar 36, 1 Siepuhoviĉ, Moskvo, Rusio.

Hodiaŭa numero 8-paĝa.

Kolektu anoncojn por ĉiutaga ET dum la XV-a!

Grandan efikon havos anoncoj en la listo de seriozaj firmoj, kiun ni publikigos en ĉiuj 5 numeroj de ET, aperontaj dum la kongreso en Nürnberg. Unu anonco (grandeco 6:2 cm) kostos por ĉiuj kvin enpresoj entute 1.50 dolaron aŭ egalvaloron; duobla anonco (6:4 cm) 2.50 dol.; kvarobla anonco (6:8 cm) 4.00 dol. — Antaŭa pago. — Kolektantoj de anonco ricevos provizion de 20%.

KONGRESVIZITONTOJ!

Cu vi iam posedas „Natan la Saĝulo“, BUTIN & JUNG, GODESBERG (GERM.)

CIULANDAJ KOLEKTANTOJ ATENTU! Mi deziras interŝanĝi poŝmarkojn ĉiukvante (rekomende)...

„UKRAINA STELO“ Organo de ukrainaj Esperantistoj.

Plej bona informilo pri popolaj vivo, kutimoj, moroj, suferej kaj krea spirita forto de ukraina nacio.

Mandeseĝoj!

Kontraŭ 2 ŝil., 1 guldo, 2 sv. kr., 1 peso, 1 yen, 2 pesetoj, 2 sv. frank., 1 dolaro, 10 liroj en rekomendita (registrita) letero.

Granda novaĵo! Oraklo-ovoj!

Ili respondas al la demando: Kiel mi estas amata? Per kio mi atingos sukceson? Tekstoj en Esperanto.

Agentoj serĉataj por revendado de argilo el Preschen en la keramikaj fabrikoj de Italujo. Rudolf Löschner, Preschen (Ĉeĥosl.)

Anoncetoj.

EDZIĜO. — Okaze de edziĝo de mia grupestro Kurt Kanzler kun fino Maria Wiedenhofer, ambaŭ en Wiesdorf...

Korespondo kaj Interŝanĝo.

Fraŭlo 30-jara deziras korespondi kun serioza fraŭlino por posta edziĝo. Propozonj al Edmundo Vincze, oficiisto en Caransebes (Rumanio, Banat).

S-o A. Demin, Lermontova 55, en Novonikolajevsk, Siberio (Ruslando) interŝanĝas pm., let. kaj pk.

Tarifo de ET.

Abono. Oni neniam abonu por tiu tempo, sed nur por certa nombro de sinsekvaĵoj. Post ricevo de la monsumo ni liveras ET laŭ la nomumera prezo...

Listo de Landoj

kun indiko de nomumera prezo (P), agentejo (A) kaj banko (B) en la unuopaj landoj. Argentina. P 0.15 pezo.

Japano. P 0.10 jeno. A Morizo G. en Tokio, Aojama, Kijoto...

Reklamo.

Anoncoj. Anoncoj pri Esperantista vivo, naskiĝo, fianĉiĝo, edziĝo, morto, okazontaĵoj...